

1978 junio

71-a jaro

n-ro 870 (6)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

NE ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando



estrara raporto



Vi trovos

preskaŭ nur la Raporton de la Estraro por la laborperiodo 1977/78 en ĉi tiu numero de la revuo. Tio kontraŭas nian pasintjaran promeson ĉi-loke pri koncizeco de la Raporto, kiu devus lasi spacon ankaŭ al novaĵoj atingintaj nin post la apero de la maja revunumero. Nu! Kion fari!? Kiam ni faris la promeson, UEA havis alian Estraron, kiu jam estis preskaŭ "ellerninta" la koncizo-arton. Nun jam temas pri la nova Estraro, elektita en Rejkjaviko, kaj la "koncizo-lekcioj" devas rekomenciĝi. Espereble do venontjare vi legos pli koncizan Raporton!? Tamen, la laborperiodo 1977/78, tiu "islanda" jaro en la vivo de UEA, estis multilate unika kaj historie grava. Ĝi tial meritas ampleksan pritrakton. Ĉu tio estas kontentiga pardonpeto pri la unutona enhavo de ĉi tiu revunumero? Atentu kelkajn gravajn novaĵetojn sur la paĝoj 125 kaj 126! Atendu la venontmonatan numeron, kiu pro novaĵamasigo devus fariĝi riĉa kaj interesa. Se ne estos tiel, — kulpos la redakcio. Saluton!

Enhavo

- 109 Universala Esperanto-Asocio: Raporto de la Estraro pri la agado dum la laborperiodo 1977/78
 - Enkonduko
 - Ĝeneralajoj
- 110 Administrado
- 111 Financoj
 - Institucio Hodler '68
 - Revuo
- 112 Kongresoj
- 113 Informado
- 114 Eksteraj rilatoj
- 116 Kulturo kaj Edukado
- 117 Junulara sekcio (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo)
- 119 Landa kaj faka agadoj
- 120 Esploro kaj dokumentado
- 121 Finaj vortoj
- 122 Financaj aldonajoj al la Raporto:
 - Spezoj por la jaro 1977
 - Bilanco de UEA je la 31a de decembro 1977
- 123 Revizora deklaro pri la jaro 1976
 - Revizora deklaro pri la jaro 1977
 - Revizora raporto de la komitataj revizoroj
- 124 Buĝeto de UEA por la jaro 1979
 - Spezoj de la 62a Universala Kongreso en Rejkjaviko
- 125 Rekalkulitaj spezoj de la 58a Universala Kongreso en Beograd, 1973
 - Klarigo pri la rekalkulita spezokonto de la 58a UK
- 126 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 128 Nekrologoj (I.G. Kudrjavickij, L. Márton, L. Pickel, A. Sproeck, F. Sviták, M. Veličković)
 - Anoncetoj

La kovrilo

En la ses ciferojn kaj la iom nekutiman dividostrekon inter la du jaroj ni klopodis plekti vizaĝojn kaj scenojn, kiuj donis sian stampon al la laborperiodo 1977/78. La disponeblaj fotoj — ili ĉiuj aperis dum la jaro en nia revuo — devigis nin ruzi kaj uzi la lastajn rezervojn de elturniĝa talento. Kelkfoje, tamen, niaj klopodoj ne sukcesis kaj pluraj vizaĝoj markintaj la jaron restis ekster nia kovrilo. Konsolo estas, ke tiuj bildoj plej ofte okupis la tuton de la kovrila spaco dum la koncerna laborperiodo en la vivo de la Asocio.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1881-1910). Legantoj en 86 landoj.

Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo por unu kalendara jaro: 33,00 gld. (kun membreco kaj Jarlibro 55,— gld). Unuopa ekz. 3,— gld.

Anonctarifo: 1p. 500 gld. 1/2p. 265, 1/4p. 145, 1/8p. 85, 1/16p. 55 gld. Nemovadaj komercaj entreprenoj pagas duoble. Anoncoj sur la ekstera kovrilpaĝo kostas duoble. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-singel 93, 3012 AE Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj kaj la Financa Programo: d-ro Humphrey Tonkin, 35 Violet Lane, Lansdowne PA 19050, Usono; telefono (215) 259 8821.

Vicprezidanto kaj estrarano pri informado kaj kulturo: mag. William Auld, 20 Harviestoun Road, Dollar, Clacks., FK14 7HG, Britio; telefono (02594) 2339.

Vicprezidanto kaj estrarano pri faka agado kaj la delegita reto: prof. d-ro Carl Støp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, Oslo 2, Norvegio; telefono (02) 44 80 85.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri planado: d-ro Werner Bormann, Schärstr. 26, D-2050 Hamburg 80, FR Germanio; tel. (040) 7384508.

Estrarano pri landa kaj regiona agado: s-ino Ursula Grattapaglia, Caixa Postal 04-0097, BR-70000 Brasília, Brazilo.

Estrarano pri administrado, financoj kaj specialaj taskoj: s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstraat 51, B-8310 Brugge, Belgio; telefono (050) 35 49 35.

Estrarano pri edukado: s-ro Andrzej Pettyn, skr. poczt. 46, PL-05-710 Milańówek, Pollando; tel. 58-37-08.

Estrarano pri kongresoj kaj turismo: d-rino Flora Szabó-Felső, Várady A. út. 4, H-7621 Pécs, Hungario; telefono (072) 16 725.

Raporto de la Estraro

pri la agado dum la laborperiodo 1977/78

1. ENKONDUKO

Jam fariĝis bona tradicio, ke la raporto de la Estraro de UEA atingas la plej vastan publikon per aperigo en la revuo *Esperanto*. Tial ankaŭ ĉi-jare tiu ĉi raporto okupas plurajn paĝojn de la asocia organo. La membroj de UEA, kiuj ne estas samtempe ricevantoj de la revuo, kaj ĉiuj interesitaj esperantistoj povas peti senpagan ekzempleron de ĉi tiu numero ĉe la Centra Oficejo. Tiu ĉi raporto estas kompilita, laŭ artikolo 30 de la Statuto de UEA, de la ĝenerala sekretario, kiu



Statuta tasko prizorgi la Estraran Raporton:
D-ro Werner Bormann,
ĝenerala sekretario de UEA.

prenis en ĝin la informojn de la unuopaj estraranoj pri iliaj laborfakoj en la Estraro, de la direktoro de la Centra Oficejo kaj de la redaktoro de la revuo. En sia kunsido en Roterdamo, de la 21a ĝis la 23a de aprilo 1978, la Estraro akceptis tiun ĉi raporton, kiu kovras la laborperiodon de la 1-a de aprilo 1977 ĝis la 1-a de aprilo 1978. Meze en tiu periodo okazis la novelektoj dum la Universala Kongreso en Rejkjaviko; tial por faritaj laboroj parte respondecas ankaŭ estintaj estraranoj, pro fakoj antaŭe de ili prilaborataj.

2. ĜENERALAĴOJ

(1) **Statuto:** Antaŭ la Estraro, kiun la Komitato komisiis ellabori novan statutprojekton, troviĝas propono pri reviziita teksto de la nova Statuto.

(2) **Honora Patrona Komitato:** La Komitato de UEA ampleksigis ĝin per elekto de du pliaj membroj: prof. Fuĝio Egami (Japanio) kaj prof. Vasil Peevski (Bulgario).

(3) **Honoraj Membroj:** La Komitato elektis s-ron Erik Carlén (Svedio) nova honora membro. En januaro 1978 forpasis s-ino M. Haudebine. La nombro de honoraj membroj restas 15.

(4) **Komitato:** Post la novaj elektoj en Rejkjaviko la Komitato konsistis el 51 komitatanoj A, 5 B, 14 C kaj 5 observantoj, entute 75 personoj. La nombro provizore falis al 74 pro la forpaso de s-ro Graetz (Germana DR).

(5) **Estraro:** En Rejkjaviko estis elektita nova Estraro en tiu konsisto, kiu aperas sur la interna kovrilpaĝo de *Esperanto*. Okazis kunsidoj en aprilo kaj aŭgusto 1977 kaj en januaro kaj aprilo 1978.

(6) **Komisionoj kaj komisiitoj:** En Rejkjaviko la Komitato rajtigis la Estraron starigi komisionojn laŭbezzone. Ĉiuj ĝistiamaj komisionoj kaj komisiitoj estis daŭrigitaj, ĉu en sama, ĉu en ŝanĝita konsisto, escepte de la Kontrolkomisiono de Lernolibroj. Ĝin la Estraro anstataŭigis per Konsila Servo pri Lernolibroj. Krome, ĝi fondis Komisionon pri Faka Agado.

Dum la UK en Rejkjaviko la Komisiono pri Virina Agado organizis publikan kunsidon, kaj lunĉon kun gvidantoj de islandaj virinaj organizaĵoj. Sub gvido de s-ino E. Kehlet, la Komisiono prizorgas la eksterajn kontaktojn de UEA kun virinaj organizaĵoj (tereno jam bone preparita de la antaŭa gvidanto de la Komisiono, s-ino E. Bormann), kaj komencas realigi ampleksan programon por doni pli da atento al la gvida rolo de virinoj en la Esperanto-movado kaj la neceso krei kondiĉojn por pli facile akcepti virinojn en aktivan membrecon de la Asocio. En 1977 dua virino estis elektita en la Estraron de UEA, kaj du landaj asocioj (tiu de FR Germanio kaj tiu de Nederlando) nove elektis virinojn kiel prezidantojn.

(7) **Landaj kaj Fakaj Asocioj:** La nombro de aliĝintaj landaj asocioj restis 35. Daŭre estas 3 aliĝintaj fakaj asocioj. La Komitato akceptis dum la Universala Kongreso en Rejkjaviko kontraktojn pri kunlaboro kun du pliaj fakaj asocioj, Internacia Asocio de Esperantistaj Matematikistoj (IAdEM) kaj Internacia Ligo de Esperantistaj Radio-Amatoroj (ILERA). Tiel la nombro de kunlaborantaj fakaj kaj neneŭtralaj asocioj kreskis al 22 (sume do 25 fakaj asocioj). Intertraktoj pri kontrakto okazas nun kun unu plia asocio.

(8) **Ĝenerala Regularo:** La Komitato decidis aldoni en la art. 28(c) la vorton 'nur', tiel ke legiĝu: "Kvin ĉefdelegitoj aŭ delegitoj rajtas proponi nur unu kandidat-on el inter la individuaj membroj de la Asocio..." kaj forstreki en la art. 28(a) la lastan frazon, tiel ke restas nur: "Je 250 ĉefdelegitoj kaj delegitoj laŭ la stato je la 31a de decembro de la pasinta jaro estas elektata po unu Komitatano B."

3. ADMINISTRADO

(1) **Oficistoj:** La nombro de oficistoj kaj volontuloj en 1977 restis preskaŭ senŝanĝa kompare kun 1976, malgraŭ la denova dungo de konstanta kongresa sekretario, s-ro C.R.L. Power. S-ro J. Th. de Goeij, kiu fidele kaj preskaŭ seninterrompe servis dum pli ol 20 jaroj, fine devis forlasi la Oficejon pro grava malsano. Post 9-jara servo pensiigis f-ino P.W. Rietmulder. En januaro 1978 enoficiĝis f-ino L. Jacques (Belgio).

(2) **Volontula Servo:** Kiel tuttagaj volontuloj en la CO deĵoris dum diversaj partoj de la jaro Anna Brennan (Israelo), Ian Jackson (Britio) kaj Thierry Lelogeais (Francio), dum Sonoko Kuzume (Japanio) kaj J.M. Timmerman (Nederlando) regule helpis ĉiu-semajne. Ekde septembro 1977 s-ro Richard Hirsch (FR Germanio) akceptis konstantan hejmlaboron, respondecante ĉefe pri la delegita reto. S-ro Probal Daŝgupto (Hinda Unio) servis volontule en Rejkjaviko, Roterdamo kaj Nov-Jorko, kie li nun regule helpas en la agado ĉe UN.

(3) **Domo:** Pliaj ĉambroj estis komplete refarbitaj kaj tapetitaj.

(4) **Mebloj kaj maŝinoj:** Krom kelkaj novaj maŝinoj por la Centra Oficejo, en 1977 aldoniĝis la meblaro de la nove inaŭgurita Grafika Centro de UEA en Antverpeno.

(5) **Membraro:** La finaj ciferoj pri 1977 estas: Asociaj membroj 25 735; Individuaj membroj: 907 MJ, 3 888 MA, 986 DM, 18 HM, 109 MJ-K, 199 MA-K, t.e. entute 6 107 individuaj membroj (en 1976: 6 018). La sumo de ĉiuj membroj estis do 31 842 (en 1976: 31 747).

(6) **Societo Zamenhof:** La fina statistiko por 1977 montris kreskon de 10%, kompare kun 1976, en ĝia membraro, kio signifas ankoraŭ pli fortan financon subtenon al UEA de tiu grupo de konstantaj mecenatoj.

(7) **Delegitoj:** Fine de 1977 estis 26 ĉefdelegitoj; en 11 aliaj landoj funkciis perantoj. Cetere estas listigitaj 1 221 delegitoj, inkluzive de junularaj delegitoj, 173 vicdelegitoj kaj 810 fakdelegitoj, tiel ke 2 204 esperantistoj el la individua membraro de UEA servas kiel delegitoj (estas pli da delegitaj funkcioj en la jarlibro, ĉar kelkaj homoj plenumas plurajn delegitajn taskojn, ekz. kaj delegito kaj fakdelegito).

(8) **Periodaĵoj:** La 352-paĝa Jarlibro 1977 aperis ĉirkaŭ la fino de junio, en 6 700 ekzempleroj. Pri la revuo *Esperanto* vidu la ĉapitron 6. Pri la revuo *Kontakto* vidu ĉap. 11. En ĉapitro 13 aperas detaloj

pri *Esperanto-dokumentoj* (eldonkvanto 500; abonantoj 120 en Esperanto, 64 en la angla) kaj *LPLP* (eldonkvanto 1 100). Pri *UN kaj ni* (eldonkvanto 400, abonoj 39) vidu ĉapitron 9 A.

(9) **Eldona Fakoj:** Fine de 1977 aperis *Izolo* de K. Kalocsay (1 000 ekzempleroj, 80p.) *Lingvistikaj aspektoj de Esperanto* (Wells) estas kompostita, kaj progresas rapide la kompostado de *Plena analiza gramatiko* (Kalocsay-Waringhien).

(10) **Libroservo:** Nova kompleta *Katalogo de la Libroservo de UEA* aperis en septembro 1977 en 10 000 ekzempleroj kaj ampleksis 256 paĝojn. Ĝi konsiderinde stimulis la vendadon, tiel ke jam la vendosumo por 1977 montris kreskon de 15% kompare kun 1976. Komence de 1978 estis interkonsentite kun la eldonejo TK/Stafeto (Antverpeno), ke UEA funkciu kiel ĝia distribuejo — aranĝo, kiu certe plue grandigos la vendokvanton.

(11) **Abonservo:** Sekve de la decido ne plu doni makleraĵon ĉe abonperado por aliaj perantoj, tiu fakoj malkreskis je 25% en 1977.

(12) **Grafikaj laboroj:** La ĉefa kresko okazis en la nova Grafika Centro de UEA en Antverpeno, kiu ekfunkciis je tuttaga bazo fine de 1977 kaj utiligas la



Ĉi tia presmaŝino estas ankoraŭ revo de la Grafika Centro en Antverpeno, sed revo realiĝonta.

laborfortojn de deko da lokaj volontuloj, sub la gvido de komitatano Paul Peeraerts. Finance-administre tiu centro kunlaboras tre proksime kun la Centra Oficejo.

(13) **Varbado:** Nova varbkampanjo lanĉita en oktobro 1977 daŭris ĝis aprilo 1978.

(14) **Landaj oficejoj:** S-ro E. Majtanić transprenis de s-ro F.W. Rentmeister la funkcion de kotizperanto por Aŭstrio. En Israelo eklaboris nova peranto, s-ro R. Berlinerblau. La usona landa asocio, ELNA, fariĝis mem kotizperanto anstataŭ la retiriĝinta ĉefdelegito s-ro A.F. Doneis.

(15) **Poŝtmarkvendado:** La laboron transprenis nova volontulo, s-ro F. de Geus (Nederlando), kiu jam en la unuaj monatoj de 1978 atingis rimarkindajn sukcesojn. La uzitaj poŝtmarkoj akumulitaj en la CO en la lastaj jaroj prezentas kapitalan valoron de pli ol 20 000 gld.

4. FINANCOJ

A. Financa Programo

Dum 1977/78 la Programo pozitive, kvankam iom malrapide, antaŭeniris. Estis kolektita dum la jaro pli ol sesmilo da guldenoj, kiu siavice ebligis la 'aĉeton' de duona labortago de plentempa volontulo, s-ino Anna Brennan, kiu eklaboris ĉe UEA en novembro. Ŝi nun sisteme kolektas informojn kaj ellaboras projektojn por gajni novajn eksterajn subvenciojn.

B. Spezokonto

(1) **Buĝeto kaj rezulto:** La buĝeto antaŭvidis 391 130 gld. por kostoj; la fina rezulto estas 389 299 gld. Sama ekvilibro por la enspezoj (resp. 391 130 gld. kaj 389 744 gld.). El tio rezultas profito de 444,91 gld. Grandaj diferencoj inter la buĝetitaj sumoj kaj la rezultoj do ne ekzistas, krom kelkaj menciindaj esceptoj: Elspezoj: Oficejaj kostoj: buĝetite 36 400 gld., rezulto 40 251 gld. Unufojaj eldonaĵoj: nebuĝetita elspezo de 3 353 gld. (por la eldono de la *Rekomendo pri edukado*, kun aliflanke subvencio de Unesko). Enspezoj: Profito de la Libroservo: buĝetite 39 700 gld., rezulto 35 708 gld., i.a. pro la partopago de la el-



La Volontula Servo montras surprize bonajn rezultojn: Ian Jackson (sidanta) kaj Probal Daŝgupto.

donkostoj de la librokatalogo por 1977/78. Grafikaj laboroj en Roterdamo kaj Antverpeno: 13 000 gld. malpli ol antaŭvidite. Kongresaj enspezoj: 9 321 gld. pli ol buĝetite.

(2) **Konkludoj:** Dank'al la senĉesa kunlaboro de multaj gemembroj, la ĉiam bonaj zorgoj de la oficistaro kaj volontuloj en la CO, kaj la sindona gvidado de la Komisiono pri Financo kaj Administrado, ni povas konstati, ke por la tria sinsekva jaro ne estas deficito en la spezoj de UEA.

C. Bilanco je 31-12-1977

(1) **La monrimedoj** malplialtiĝis pro la fakto, ke ni povis konsiderinde plialtigi la investon en valorpapiroj per 75 852 gld. Tiu investo devus plialtigi la en 1978 ricevotajn rentojn.

(2) **Asocia kapitalo:** Kun prudenta fiero ni atentigas pri la sumoj de la kapitalaj kontoj: entute nun 560 830 gld., t.e. preskaŭ la duoblo de tiuj kontoj fine de 1973. Citinda estas la evoluo de la 'cetera kapitalo'. Tiu kapitalo, kiu estas la neta kapitalo de la Asocio, pro la fakto ke la rezervo por la dumvivaj membroj kaj la fondaĵoj estas veraj rezervoj por tiuj specifaj celoj, plialtiĝis de 8 662,47 gld. en 1974 al 86 277,75 gld.; ĝi povas do iom post iom denove funkcii kiel garantio por pli stabila financa situacio. Tamen, ni devas daŭrigi la finanĉan singardemon kiel dum la lastaj jaroj, ĉar fakte jam en 1969 la asocio posedis 'ceteran kapitalon' de pli ol 100 000 gld.

Ĉ. Finkonkludo pri la financoj

Kvankam ni nun disponas pri multe pli da financaj eblecoj ol antaŭ kelkaj jaroj, la financa situacio ankoraŭ ne permesas al ni ellabori plenefike la planojn por la disvastigo de la Internacia Lingvo. Ni cetere pli kaj pli devas eliri el la cirklo de plialtigo de kotizoj ktp. kiam la elspezoj kreskas. Nia celo do devas esti: varbado de membroj, sukcesa financa programo kaj ekspluatado de la internaciaj rilatoj en la Esperanto-movado (turismo, anoncoj, grafikaj laboroj ktp).

5. INSTITUCIO HODLER '68

(1) **Konsisto de la estraro:** S-ro G. Maertens (Belgio), prezidanto, s-ro E. Haver Schmidt (Nederlando), s-ro J. Verstraeten (Belgio), alektita en 1977, s-ro E.L.M. Wensing (Belgio) kaj s-ro E.J. Woessink (Nederlando). S-ro J.P. Lok (Nederlando) akceptis la taskon de administranto, kaj do anstataŭas f-inon M.H. Vermaas (Nederlando), kiu rezignis post multaj jaroj de laboro en la Institucio, kiun ŝi mem fondis.

(2) **Subvencioj:** Dum la jarkunveno, la 22an de majo 1977 en Roterdamo, la estraro asignis subvenciojn ĝis entute 12 000 gld. laŭ la jena divido: 500 gld. por la eldono de la *Albana ŝlosilo*, je peto de la eldonejo Voĉo, Jugoslavio; 500 gld. por la Akademio de Esperanto; 400 gld. por la eldono de la gazeto *Pacifika lumturo*, kunligilo por la esperantistoj en pacifikaj landoj; 4 000 gld. por la Fondaĵo Canuto de UEA; 1 500 gld. por la eldono de suplementaj paĝoj kun scienca temo en *Heroldo de Esperanto*; 700 gld. por la bindigo de jarkolektoj de Esperanto-revuoj ĉe la Esperanto-sekcio de la Kortrejka Urba Biblioteko (Belgio); 4 400 gld. por la Propaganda Konto de UEA.

(3) **Kontoj:** La bilanco spegulas sanan staton de la kapitalo sumiĝanta je 157 918 gld., investita diversmaniere laŭ la bazaj principoj de la statuto. Rentuma saldo de 416,59 gld. eniris la riskorezervan konton.

6. REVUO

(1) **Redaktoro:** Simo Milojević.

(2) **Amplekso kaj enhavo:** La amplekso de la jarkolekto 1977 restis sama, kiel en 1976, t.e. 220 paĝoj, plus kovriloj. Okazis iom da diskuto pri eblecoj ampleksigi la revuon, i.a. per popularsciencaj tekstoj,

sed necesas pluserĉi financajn rimedojn por tiu celo. Eksperimente, la numero de marto 1978 estis 32-paĝa, kun scienca kontribuaĵo. La Estrara Raporto 1976/77 aperis en la junia numero kaj okupis nur 13 paĝojn (kun ilustraĵoj) anstataŭ la tutan numeron, kiel en 1976; 12 paĝoj de la julia/aŭgusta numero dediĉiĝis al la 90-jara jubileo de Esperanto; dek paĝojn okupis (decembra kaj januara numeroj) la intervjuo kun d-ro Saheb-Zamani pri la Movado en Irano kaj ĝenerale pri Esperanto kaj la Tria Mondo. Rilate la enhavon okazis ankaŭ kelkaj ŝanĝoj, kiuj ne estas unuavide rimark-eblaj: recenzoj okupas pli da spaco, ol en kelkaj antaŭ-aj jaroj; radio-rubriko aperas malpli ofte; pli da atento oni dediĉas al la ekstereŭropa Esperanto-movado. Pro la graveco de la Kongreso en Islando la revuo amplekse traktis tiun aranĝon ankaŭ ekster la kutima kongresa numero en septembro. Kun la numero de decembro 1977 distribuiĝis la Unesko-eldonaĵo *Rekomendo pri edukado*.

(3) Teknika prizorgo: Kompostis oficistoj de la CO kun plurfoja helpo de volontuloj en Antverpeno. Ankaŭ la enpaĝigon kaj fotografion prizorgis la CO, kun kelkfoja ekstera helpo. Plue presis la firmo Tuijtel, Nederlando.

(4) Abonantaro; eldonkvanto: La eldonkvanto variis inter 8 800 kaj 12 100 ekzempleroj. Komence de 1978 la nova kategorio de kolektivaj abonoj atingis 2 900, kaj plia faktoro, kiu altigis la eldonkvanton — verŝajne rekordan en la postmilita periodo — estis la granda nombro de nemembroj-kongresanoj aliĝintaj al la UK en Varna kaj ricevantaj la revuon pro la pli alta kongreskotizo.

(5) Aperdato: La meza aperdato inter aprilo 1977 kaj marto 1978 estis la 6a de la koncerna monato, precize kiel en la antaŭa jaro.

7. KONGRESOJ

(1) Ĝenerala rimarko: Ne estas necese multe skribi nun pri la kongresoj, ĉar pri ili informas abunde la revuo *Esperanto*. En raporto de la Estraro de UEA troviĝas en la unua vico la Universalaj Kongresoj. Tamen, meritas atenton la multaj kongresoj kaj konferencoj aranĝitaj de aliaj Esperanto-organizaĵoj, kiuj okulfrape pravas la vivantecon de la Movado. Menciindas el tiu ĉi laborkampo, ke la diskutoj pri la spezokonto de la 58a Universala Kongreso en Beograd 1973 povis esti finitaj je ambaŭflanka kontento.

(2) 62a UK en Rejkjaviko: Unu el inter la plej sukces-aj Esperanto-kongresoj okazis de la 31a de julio ĝis la 6a de aŭgusto 1977 en la islanda ĉefurbo. Ĝin partoprenis 1 197 kongresanoj, kiuj traktis la temon: "La rajto je komunikado". La alta protektanto de la Kongreso estis d-ro Kristján Eldjárn, la prezidento de Islando. La Kongreson prezidis d-ro Humphrey Tonkin, prezidanto de UEA. Kiel prezidanto de LKK gvidis la laboron s-ro Baldur Ragnarsson. La solenecon de la Kongreso pleje karakterizis la Inaŭguro, kie la ĝenerala direktoro de Unesko, s-ro Amadou-Mahtar M'Bow,



1977 estis la "islanda" jaro de UEA: C. Støp-Bowitz (parolanta), H. Tonkin kaj M. Boulton en solenaĵo de la UK.

faris paroladon pri la kongresa temo; partoprenis ĝin krom la alta protektanto ankaŭ multaj diplomatoj kaj islandaj altranguloj. Dum la 62a Universala Kongreso la partoprenantoj ĝuis riĉan kulturen programon, el kiu aparte elstaris la prezentaĵo 'Inuk' de la Nacia Teatro de Islando.

En Rejkjaviko kunsidis la nova Komitato de UEA, kaj elektis la novan Estraron. Dum la sep kunsidoj la Komitato faris efikan laboron. La 62a UK pruvis, ke indas aranĝi kongresojn en la t.n. nekutimaj landoj kun malforta organizita Movado.

(3) TEJO-Kongreso: La 33a Internacia Junulara Kongreso de TEJO okazis de la 9a ĝis la 16a de aŭgusto 1977 en Poitiers (Francio). Vidu pri tio la ĉapitron 11. (7).

(4) 63a UK en Bulgario: En la jaro 1978, laŭ invito de Bulgara Esperantista Asocio, la 63a okazos inter la 29a de julio kaj la 5a de aŭgusto en la apudmara urbo Varna. LKK-prezidanto estas s-ro N. Aleksiev.

(5) 64a UK en Svislando: Laŭ la decido de la Estraro de UEA, la 64a UK okazos de la 28a de julio ĝis la 4a de aŭgusto 1979 en Lucerno.

(6) 65a UK en Svedio: En 1980 Universala Esperanto-Asocio havos sian kongreson en la sveda ĉefurbo Stokholmo inter la 2a kaj la 9a de aŭgusto.

(7) 66a UK en Brazilo: La Estraro de UEA principe decidis akcepti la inviton organizi en 1981 la 66an UK en la brazila ĉefurbo Brazilio.

8. INFORMADO

(1) **Komisiono pri Informado:** Dum la 62a UK en Rejkjaviko, s-ro W. Auld, vicprezidanto de UEA, estis komisiita novformi la Komisionon pri Informado. Li proponis al la Estraro jenajn nomojn: L. Kosieniak (Pollando), B. Miličević (Jugoslavio) kaj J. Muramacu (Japanio).

(2) **Radio:** Dum la jaro la radiostacioj daŭrigis sian disaŭdigon de novaĵoj kaj informoj, tute precipe Pola Radio kaj Radio Zagreb (kiu lasta festas en 1978 sian 25-jaran jubileon de la Esperanto-elsendoj). En januaro 1977 komenciĝis regulaj elsendoj en Esperanto de Radio Vatikano, dum Portugala Nacia Radio komencis sian regulan programon en februaro 1978, kaj Radio Moskvo (ankaŭ en februaro 1978) dufoje elsendis eksperimentan programon en la Internacia Lingvo. Laŭ kunlaboranto de CED, s-ro Georges Larglantier, kiu jam dum pluraj jardekoj statistikas la radio-programojn en Esperanto, en 1977 entute 14 radiostacioj havis regulajn dissendojn en la Internacia Lingvo. Menciinde estas, ke dum la jaro okazis vigla publika diskuto (ĉefe en *Pilo Press* kaj *Eŭropa Esperanto-revuo* pri la rolo de la elsendoj en la Movado. Grava kontribuo de UEA al la popularigo de la radio-elsendoj estas la regula radiorubriko en la revuo *Esperanto*.

(3) **Internacia Gazetara Servo (IGS):** En decembro 1977 reviviĝis la iama Internacia Gazetara Servo de UEA. Bultenoj en la angla kaj franca lingvoj estis dissenditaj al centoj da nacilingvaj ĵurnaloj, kaj en Esperanto al la movada gazetaro. Tiuj bultenoj estis kontentige utiligitaj en multaj landoj, inkluzive de Irano, Brazilo kaj Turkio. La servon gvidas s-ino Anna Brennan.

(4) **Televido:** En pluraj landoj (Belgio, Brazilo, Italio, FR Germanio, Venezuelo, Nederlando, Jugoslavio, Francio k.a. okazis televidaj elsendoj pri Esperanto. Post la 62a UK la Islanda Televido elsendis duonhoran debaton en Esperanto pri la rajto je komunikado.

(5) **Ekspozicioj:** Nekompleta statistiko pri Esperanto-ekspozicioj dum la pasinta jaro montras, ke okazis plurdeko da tiaj aranĝoj, i.a. en Svedio, Japanio, Germana DR, Brazilo, Italio, Usono, Nov-Zelando, Belgio, Nederlando, Francio kaj Hispanio. En multaj kazoj UEA liveris materialojn por tiaj ekspozicioj. En Svislando oni faras tre ampleksajn preparlaborojn por granda ekspozicio pri Esperanto kaj interlingvistiko. Tiu ekspozicio malfermiĝos venontjare en la Nacia Biblioteko en Berno.

(6) **Prelegvojaĝoj:** Pluraj prelegvojaĝoj okazis laŭ iniciato de landaj asocioj aŭ lokaj grupoj (japanino Mikiko Mimori tra Eŭropo, la forpasinta s-ino M. Haudebine prelegis i.a. en FR Germanio, d-ro V. Sadler en Irano, polino A. Michiewicz en Danlando ktp.). Elstara entrepreno de UEA sur ĉi tiu kampo estis, ke dum decembro 1977 s-ino Ursula Grattapaglia, estrarano pri landa kaj regiona agadoj, oficiale vizitis jenajn landojn, por kontakti kaj instigi

la esperantistojn en Sud-Ameriko: Brazilo, Urugvajo, Argentino, Ĉilio, Ekvadoro, Bolivio, Peruo, Kolombio kaj Venezuelo. Tiu entrepreno povus signi tute novan etapon por la internacia Esperanto-movado, ĉar eĉvidentiĝas gravaj konkretaj rezultoj de la vojaĝo. Menciindas ankaŭ la vizito de s-ro August Weide (FR Germanio) al Koreo, por helpi en la vigla Esperanto-instruado tie.

(7) **Landaj Informaj Fakoj:** En la plimultaj landoj informoj pri Esperanto aperis lastatempe pli ofte en la nacilingva gazetaro, en radioprogramoj kaj televidaj elsendoj. En Norvegio, ekzemple, dum 1977 aperis pli ol 300 novaĵoj kaj artikoloj pri la Internacia Lingvo. En Irano la furora disvastiĝo de Esperanto daŭris eĉ pli impone. La Universitato de Teherano interalie komencis reprodukti la multnombrajn informojn pri la Esperanto-movado, kiuj aperadas en la gazetaro, en la formo de bultenoj sub la titolo *Esperanto kaj la gazetaro*. Tiuj bultenoj estas distributaj en miloj da ekzempleroj, ne nur enlande sed ankaŭ al iranaj studentoj tra la mondo.

Multaj informoj aperis en la nacilingva gazetaro ankaŭ en aliaj landoj, ekzemple Pollando, Francio, Jugoslavio, Luksemburgo, Hungario, Svedio, Japanio (kie okazis tuta informa kampanjo en la gazetaro), Kolombio kaj Brazilo. Artikoloj aperis ankaŭ en Rumanio, Kuvajto kaj Hinda Unio. Oftaj estis radioprogramoj pri Esperanto (Venezuelo, Belgio, Svedio, Britio). Aparte menciindas kvaronhora radioparolado pri Esperanto en Hinda Unio. Laŭ la iniciato de Pola Esperanto-Asocio, en Varsovio antaŭ kelka tempo aperis la pollingva broŝuro *Ruch esperancki na świecie* (La Esperanto-movado en la mondo). La broŝuro, kies aŭtoro estas A. Pettyn, enhavas bazan informan materialon pri Esperanto, kies celo estas informi prelegantojn kaj ĵurnalistojn. En Britio, kie la informado pri Esperanto inter la parlamentanoj estas aparte vigla, komenciĝis ne malpli vigla agado en la sindikataj rondoj. Fondiĝis TUCEG (anglalingva mallongigo de Sindikata kaj Koopera Esperanto-Grupo). Inter la apogantoj de la grupo troviĝas entute 12 gravaj sindikataj funkciuloj kaj 23 parlamentanoj. Svedio daŭre dediĉas grandan atenton al la nacilingva informa laboro. Ĝia svedlingva periodaĵo *Esperantonytt* denove aperis en 50 000 ekzempleroj post la Kongreso en Rejkjaviko. Sveda Esperanto-Federacio faris plian laŭdindan paŝon sur la informa kampo: ĝi eldonis specialan informilon por la bezonoj de Malta Esperanto-Societo en la malta lingvo.

La 62a UK en Rejkjaviko kompreneble vekis multe da intereso en la kongreslando, kaj dum la UK mem okazis podiskuto pri Esperanto inter du esperantistoj kaj tri islandanoj, en ĉeesto de miksitaj publiko.

Interese estas, ke la plej forta pledo por Esperanto venis de islanda sindikata funkciulino, kiu sidis en la publiko.

(8) **Informado en fakaj medioj:** Dum la jaro UEA reprezentigis en pluraj internaciaj fakaj kongresoj kaj konferencoj, kies temoj rilatis al Esperanto aŭ al la

lingva problemo ĝenerale. Aparte menciinda estas partopreno en la kongreso pri lingvaj baroj, okazinta en majo 1977 en Luksemburgo. Pli frue en la jaro, pluraj funkciuloj de UEA prelegis en simila scienca konferenco en Saint Louis (Usono). Esperantistoj partoprenis ankaŭ la 17an kongreson de mondfederistoj kaj mondanistoj, meze de 1977 en Parizo. Gravan informan rolon plenumas ankaŭ kelkaj novaj universitataj kursoj pri esperantologio aŭ interlingvistiko (Baŝkira Universitato en Soveta Unio, Humboldt-Universitato en Germana DR). Valoran kontribuon al la informado pri Esperanto en sciencaj rondoj daŭre donas la agado en Paderborn (FR Germanio). Krome, en pluraj sciencaj periodaĵoj aperis studoj pri la Internacia Lingvo kaj dum la jaro kelkaj junaj sciencistoj promociiĝis per tezoj, kies temo koncernis la Internacian Lingvon aŭ la Esperanto-movadon (i.a. en Meksikio, Soveta Unio kaj Malto).

Aparta kontribuo al la informa laboro estas la eldono de la broŝuro *Vastaj horizontoj*, kiu aperis en sep naciaj lingvoj, celante unuavice skoltajn organizaĵojn tra la mondo. Tiu tuta entrepreno financiĝis ĉefe el rimedoj, kiujn al Skolta Esperanto-Ligo disponigis la Financa Programo de la Esperanto-Movado.

9. EKSTERAJ RILATOJ

A. Ĝeneralaj informoj

La Komisiono pri Eksteraj Rilatoj kunsidis en Rejkjaviko dum la UK kaj en januaro en Roterdamo. Dum la UK ĝi organizis tre sukcesajn kunsidojn pri agado ĉe Unuiĝintaj Nacioj (en kiu parolis i.a. ambasadoro Ralph Harry) kaj pri sindikata agado. La Estraro denove nomis s-ron Grahame Leon-Smith (Britio) komisiito de UEA pri parlamenta gado. Al la Komisiono aldoniĝis nova funkcio, tiu de kontakto inter UEA kaj nederlandaj instancoj. Tiun taskon prizorgas s-ro E.J. Woessink. Dum la jaro daŭre aperis la informilo de UEA pri la agado ĉe UN kaj ĝiaj instancoj, *UN kaj ni*. Tiu informilo, kiu estas abonebla ĉe UEA, estis redaktata tre trafe de s-ino A. Woessink-Nagata.

B. Unuiĝintaj Nacioj kaj ties instancoj

(1) Unuiĝintaj Nacioj, Novjorko: UEA nun havas en Novjorko anon de la Volontula Servo, s-ron Probal Daŝgupto (Hinda Unio), kiu vigligas la kontaktojn kun la Sekretariato de UN kaj teknike apogas la iniciatojn de la Esperanto-Klubo ĉe UN kaj aliaj Esperanto-parolantoj en kaj apud la Sekretariato. UEA estas regule reprezentata en la kunsidoj de la neregistaraj organizoj en konsultaj rilatoj (i.a. UEA) kun la Ekonomia kaj Socia Konsilio pere de sia oficiala reprezentanto, s-ro Starr, lia anstataŭanto, s-ino Newell-Lorie, aŭ de s-ro Daŝgupto. La laboron de la Esperanto-Klubo oni lastatempe raportis en la bulteno de la Sekretariato, *Secretariat News*. En aprilo la prezidanto de UEA faris publikan paroladon en unu el la ĉefaj sekretariat-aj kunvenejoj, pri Esperanto kaj la rajto je komunikado.

S-ro Daŝgupto prizorgas ellaboron de detala propono, espereble baldaŭ prezentota al UN, pri eksperimenta utiligo de Esperanto en la dokumentado ĉe UN. Kiel UEA jam raportis (*Esperanto*, januaro), la lingva situacio en UN denove fariĝas aktuala demando, kaj tio prezentas por UEA eluzeblan okazon. Kunlige kun la menciita propono jam okazis kunsidoj inter la prezidanto de UEA kaj reprezentantoj de kelkaj naciaj UN-delegacioj.

UEA partoprenas la preparlaboron por la Internacia Jaro de la Infano. S-ino Julie Tonkin, kiel reprezentanto de la Virina Komisiono de UEA, partoprenis la unuan preparakunsidon de la neregistaraj organizoj en Novjorko en junio.

(2) Universitato de UN, Tokio: Reprezentanto de la Komisiono en Tokio estas nun s-ro Kei Kurisu. La Universitato de Unuiĝintaj Nacioj, sendante bondezir-ojn al la UK en Rejkjaviko, informis pri sia deziro aktive studi la rilatojn inter la lingva problemo kaj la ekonomia evoluigo, precipe en la evoluantaj landoj. Tio ĉi estas temo, kiu levas amason da demandoj koncerne lingvan diskriminacion kaj kulturan pluralismon. UEA jam delonge klopodas konvinki la Universitaton, ke ĝi dediĉu al la demandoj atenton. La studo ankoraŭ ne komenciĝis, sed UEA sekvas la evoluon kaj jam proponis sian kunlaboron.

(3) Monda Organizo pri Sano, Ĝenevo: Okazis sporad-aj kontaktoj kun MOS, kies diskriminacian lingvan politikon UEA klopodas influi kaj ŝanĝi.

(4) Unesko, Parizo: Certe la ĉefa novaĵo de la jaro sur la kampo de eksteraj rilatoj estis la vizito de la ĝenerala direktoro de Unesko, Amadou-Mahtar M'Bow, al la 62a Universala Kongreso de Esperanto en Rejkjaviko. Tiu vizito okazis rezulte de paralelaj invitoj al s-ro M'Bow de la islanda registaro kaj de UEA. Li pasigis unu tagon ĉe la Kongreso en la kadro de tritaga oficiala vizito al Islando.

La ĉefa temo de la 62a UK estis "La rajto je komunikado". S-ro M'Bow, la ĉefa parolanto en la Solena Inaŭguro, utiligis la okazon de nia UK (la unua granda konferenco de neregistara organizo pri tiu temo) por fari sian unuan plampleksan paroladon pri la temo. La kompleta teksto, kiu tre pozitive aludis al la aspiroj kaj atingoj de UEA kaj Esperanto, aperis en la septembra numero de nia revuo. Unesko poste distribuis la tekston en la angla kaj franca lingvoj al ĉefaj funkciuloj de Unesko, naciaj komisionoj ktp. Oni vaste raportis pri la vizito kaj la parolado en la islanda gazetaro, kaj dank'al interveno de niaj membroj, ĝi estis ankaŭ raportita aŭ represita en la gazetaro en multaj aliaj landoj. Ankaŭ la eldonaĵoj de Unesko raportis pri la vizito.

S-ro M'Bow estis gasto de la Asocio en neformala lunĉo, kiun ĉeestis dudeko da estraranoj kaj funkciuloj de UEA, kaj kiu plifirmigis lian tre pozitivan sintenon. La prezidanto de UEA kaj s-ino Tonkin estis siavice gastigitaj en intima bankedo por anoj de la islanda kabineto kaj la diplomata servo, kiun la islanda kulturministro aranĝis por s-ro M'Bow.

La Islanda Unesko-Komisiono, kunlabore kun UEA, organizis fotoekspozicion pri Unesko, kiun malfermis dum sia vizito al la UK la ĝenerala direktoro. Ĉeestis la malfermon la ŝtatprezidanto de Islando kaj aliaj eminentuloj de la islanda kultura kaj politika vivo. La indikoj ĉe la ekspozicio estis en Esperanto kaj la islanda.



Multa maldormo por organizi bonan kongreson: La kerno de la rejkjavika LKK "kunsidas" inter kongresaj aranĝoj.

La diskutoj en Islando pri la rajto je komunikado havis signifajn sekvojn en la kunlaboro kun Unesko. UEA estas invitita kontribui per siaj konsiloj kaj konkretaj referaĵoj al la estontaj kunvenoj de specialistoj pri la rajto je komunikado, kaj ĝi estas intime plektita en la laboron de la Internacia Komisiono pri Problemoj de la Komunikado, kiun la ĝenerala direktoro starigis, sub gvido de s-ro Sean McBride, post sia reveno el Rejkjaviko. En novembro, propono iniciatita de UEA, ke la neregistaraj organizoj en konsultaj rilatoj kun Unesko okazigu simpozion pri la rajto je komunikado, estis akceptita de la Konferenco de NRO-j per granda plimulto. La simpozio okazos en Parizo de la 12a ĝis la 16a de marto 1979.

En decembro estis publikigita de Unesko Esperanto-traduko de la *Rekomendo pri edukado por internaciaj kompreniĝo, kunlaboro kaj paco kaj edukado rilate al homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj*. La tradukon prizorgis UEA laŭ kontrakto kun Unesko. La *Rekomendo*, akceptita en 1974, estas inter la ĉefaj internaciaj aktoj sur tiu ĉi tereno. Ĝi estas la unua teksto eldonita de Unesko en Esperanto, kaj la unua eldonita kunlabore inter Unesko kaj UEA depost 1962. Frue en 1978 UEA publikigis ampleksan raporton pri la pritrakto de la rajto je komunikado en la Rejkjavika kongreso. Tiun raporton kaj aliajn

informojn pri UEA kaj la Internacia Lingvo UEA distribuas al ĉiuj ĉefaj funkciuloj de Unesko, Unesko-komisionoj ktp.

Surloke en Parizo gvidas la kontaktojn kun Unesko komisiono sub prezido de s-ro E. Chicot. Anoj de tiu komisiono regule ĉeestas kunsidojn de la neregistaraj organizoj kaj aktive partoprenas la simpoziojn kaj seminariojn organizitajn de la NRO-j ĉe Unesko. Dum la jaro la prezidanto de UEA dufoje vizitis Parizon por interparoloj kun funkciuloj de Unesko — en majo 1977 kaj en januaro 1978.

En 1977 UEA havis la plezuron bonvenigi duan Esperanto-organizon en formalajn rilatojn kun Unesko: Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj fariĝis organizo en rilatoj de reciproka informado, kategorio C. Jam komenciĝis kunlaboro inter UEA kaj ILEI en la kontaktoj kun Unesko. Daŭris dum la jaro intimaj kontaktoj kun naciaj Unesko-komisionoj en pluraj landoj, interalie Islando, Nederlando, Japanio kaj Madagaskaro.

C. Aliaj registaraj organizoj

(1) Organizo de Amerikaj Ŝtatoj, Vaŝingtono: Dank' al interveno de la reprezentanto de UEA, s-ro

A. Correa, komenciĝis formalaj kontaktoj inter la Fakoj pri Edukado, Scienco kaj Kulturo, kaj UEA. En kunsido en februaro inter la prezidanto de UEA kaj la estro de tiu fakoj, s-ro Gonzales-Reyes, la unuaj paŝoj al starigo de formalaj konsultaj rilatoj estis faritaj.

(2) Eŭropa Komunumaro, Bruselo: Formiĝis el la landaj asocioj de UEA en la ŝtatoj-membroj de EK la Eŭropa Esperanto-Unio, kaj Eŭropa Esperanto-Centro (EEC) fariĝis ĝia sekretario. En septembro EEC malfermis oficejon en Bruselo por prizorgi kontaktojn kun EK kaj aliaj organizoj en tiu urbo. Dank'al ĝia agado la kontaktoj kun EK plioftiĝas. La oficejo prizorgas ankaŭ la eksterajn rilatojn de UEA en Bruselo. Ĝi reprezentas tre signifan plifortiĝon de la kapablo de UEA sur la tereno de eksteraj rilatoj.

(3) Eŭropa Komunumaro, Luksemburgo: La malfermiĝo de informa oficejo pri Esperanto en Luksemburgo sub gvido de Pastro Kindler multe faciligis la kontaktojn kun EK-instancoj en Luksemburgo, precipe la Eŭropa Parlamento. En majo 1977 UEA estis reprezentita en la Konferenco de EK pri "Rompi la lingvan barilon" — konferenco ĉefe de specialistoj pri informadiko kaj komputoroj. Esperanto leviĝis kiel temo en pluraj ties kunsidoj kaj ricevis ĝenerale pozitivan pritrakton.

(4) Eŭropa Konsilio, Strasburgo: Kvankam UEA havas kontaktulojn en Strasburgo, tiu ĉi estas ankoraŭ la plej malforta ĉenero en la kontaktoj kun la t.n. eŭropaj instancoj. Kunlabore kun la komisiono pri eksteraj rilatoj de UFE (Unuiĝo Franca por Esperanto), UEA kaj EEC nun klopodas starigi laborgrupon en Strasburgo, kiu prizorgu kontaktojn kun la Eŭropa Konsilio kaj la Eŭropa Parlamento. Raporto pri la instruado de fremdaj lingvoj, prezentita al la Parlamenta Asembleo de la Eŭropa Konsilio en septembro 1977, enhavis

plurajn negativajn aludojn al Esperanto sed rezultigis plurajn tre pozitivajn intervenojn de unuopaj parlamentanoj, anoj de parlamentaj Esperanto-grupoj en propraj landoj. Poste UEA kaj UFE intervenis ĉe la konsilianoj per informoj pri la atingoj kaj perspektivoj de Esperanto.

Ĉ. Neregistaraj organizoj

Multaj malnovaj kontaktoj kun NRO-j estis daŭrigitaj aŭ restarigitaj. UEA reprezentigis en konferencoj de kelkaj NRO-j (FIOCES: Internacia Federacio de Organizoj por Lernejoj Korespondado kaj Interŝanĝoj, Amnestio Internacia, Sennacieca Asocio Tutmonda ktp.) kaj pluraj NRO-j sendis siajn reprezentantojn al la kongreso de UEA. En komuna internacia konferenco de mondfederistoj kaj mondcivitanoj en Parizo en julio 1977 (v. *Esperanto*, oktobro), UEA estis reprezentita de sia estrarano s-ro Woessink, kaj en la ĝenerala kunsido de la mondcivitana organizo estis akceptita rezolucio favora al Esperanto.

D. Registaroj kaj nacia agado

La parlamenta agado kontentige progresas en pluraj landoj. Nova parlamenta grupo fondiĝis en Italio, kaj aparte vigla parlamenta agado okazis en Francio kaj Brazilo. La agado en la unuopaj parlamentoj certe influis la supre aluditajn intervenojn en la Parlamenta Asembleo de la Eŭropa Konsilio, kiu bele ilustras la gravecon de tiu ĉi laboro. UEA de tempo al tempo dum la jaro eldonis sian *Esperanto-kurieron parlamentan*, sub redakto de s-ro David Curtis (Britio), por kunligi la agadon.


La enlanda reeĥo rezulte de la UK en Islando estis elstara kaj okulfrapa. La organizantoj de la kongreso sukcesis enpenetri la plej altajn tavolojn de la nacia vivo. La alta protektanto de la Kongreso, la ŝtat-prezidanto mem, ĉeestis la inaŭguron kaj gastigis centon da kongresanoj en sia rezidejo. La ministro pri kulturo kaj la urbestro alparolis la inaŭguron en perfekta Esperanto. Diplomatoj el i.a. Soveta Unio, Usono, Ĉinio kaj Francio ĉeestis la inaŭguron, kaj multaj islandaj eminentuloj estis ligitaj al unuopaj eroj en la kongresa programo — ekzemple pere de la aktivecoj de la Virina Komisiono, Teatra Vespero, Islanda Vespero, ktp.

Ankaŭ en aliaj landoj okazis pluraj signifaj sukcesoj ĉe naciaj registaroj, ekzemple en Usono, kies ŝtatprezidanto, per salutmesaĝo al la nacia Esperanto-kongreso, laŭdis la kontribuojn de la parolantoj de Esperanto al internacia interkompreno (*Esperanto*, oktobro).

10. KULTURO KAJ EDUKADO

A. Kulturo

La Esperanto-kulturo manifestiĝas diversmaniere, sed sendube unu el ĝiaj plej gravaj kaj signifoplenaj facetoj estas la eldonagado. Dum 1977 aperis 33 novaj eldonaĵoj beletraj. Inter ili estis sep originaloj, inkluzive de la romano *Fianĉo de l'sorto* de Johan Hammond



Riĉa rikolto en 1977: Parto de la noveldonitaj libroj.

Rosbach, kaj la poemaro *Izolo* de Kolomano Kalocsay. Tiun lastan eldonis UEA fotoreprese laŭ la preskaŭ tute pereinta, neniam aĉetebla, unua eldono (1939). La tradukoj originis el dek kvar lingvoj, el kiuj 10 eŭropaj kaj kvar aziaj: angla, bengala, ĉina, dana, estona, franca, germana, hispana, hungara, japana, korea, nederlanda, skota kaj slovaka. Inter la tradukitaj aŭtoroj troviĝas pluraj mondfamaj: Shakespeare, Burns, Tagor, Camus, Brecht, Mann, Nietzsche, kaj aldoniĝis ankoraŭ unu al la grava serio de naciaj antologioj: *Slovaka antologio*. Sed probable la plej grava traduko de la jaro estas *La inĝenia Hidalgo Don Quijote de la Mancha* de Miguel de Cervantes Saavedra, tradukita de Fernando de Diego. (Tiun libron laŭdinde ornamas gravuraĵoj de Gustave Doré).

Alia grava manifestaĵo de la internacilingva kulturo estas ĉiam la Universalaj Kongresoj. Elstara inter la kulturaj aranĝoj de la 62a estis la teatraĵo *Inuk*, prezentita de kvin geaktoroj de la Nacia Teatro de Islando. Neforgesebla prezentado el la vivo de eskimoj kulture detruataj de la 'civilizo' emociis la tutan spektantaron. Ankaŭ Pola Esperanto-Teatro prezentis dramon en Rejkjaviko, ĉifoje la teatraĵon *La hipnoto* de A. Cwojdzinski. La Luksemburga Pupteatro de Triksini prezentis *La butikista korbo* de H. Sachs.

Internacia Somera Universitato: La 30a sesio de ISU okazis en la kadro de la 62a UK. La rektoro, mag. Á. Bödvarsson, iniciatis pro multjara insista petado de kongresanoj, trisesian 'tujkurson' pri la kongreslanda lingvo, kiu amase allogis la kongresanojn. Naŭ aliaj prelegantoj paroladis pri diversaj temoj, el kiuj pluraj

estis rekte ligitaj al la kongresa ĉeftemo "La rajto je komunikado", kaj du el la prelegantoj, d-roj Lieberman kaj Pool, ankaŭ gvidis kolokvojn. S-ino M. Haudebine gvidis tre sukcesan Ĉe-metodan seminarion. Krom tio, mag. W. Auld gvidis trisesian progresigan kurson, kaj okazis ankaŭ kvarkunvena konversacia rondo, ambaŭ multnombre partoprenitaj (gvidis s-roj Simonnet kaj Salzmänn). Nunjare ne okazis Internacia Ekzameno, kiun, cetere, estrarano mag. W. Auld ankoraŭ esploras por eventuala modifo aŭ plivastigo.

Belartaj Konkursoj: Plena raporto pri la nunjaraj konkursoj aperis en la oktobra numero de la revuo. Por la dua fojo la konkursoj estis aranĝitaj ekskluzive por verkoj originalaj. 56 konkursaĵoj estis ricevitaj: prozaj 16, poeziaj 32, teatraj 6, kaj eseaj 2. Bedaŭrinda estis la magra partopreno en la esea branĉo, kaj la Premio Luigi Minnaja ne estis aljuĝita. Por la Fotokonkurso estis ricevitaj 13 eroj. Pro la manko de tradukaj branĉoj en la Belartaj Konkursoj, la Esperanto-Ligo de Nord-Ameriko kaj la Londona Esperanto-Klubo kune starigis konkurson por tradukoj el la angla lingvo, kaj la itala konkurso 'Larius' iniciatis tradukajn branĉojn. Ambaŭ ricevis aŭspicion de UEA.

Aliaj Kulturaj Aranĝoj dum la UK: Kiel kutime, la programo de la 62a UK inkluzivis ankaŭ aliajn kulturajn aranĝojn: Islandan Vesperon, Internacian Artan Vesperon, kvizon "Por ke vi sciu", orgenkoncerton de D. Hill (Britio). Unika kaj elstara aranĝo, kvazaŭ manifestacio de la Esperanta kulturo, estis akcepto por celebri la 25an jubileon de la libromarko 'Stafeto', kiun laŭinvite partoprenis plurdeko da Esperantaj



Teatro spertas furoron en la Movado: Trupoj aktivas en Brazilo, Bulgario, Finnlando, Francio, Hungario, Jugoslavio, Pollando, Soveta Unio kaj Svislando.

verkistoj kaj aliaj aktivuloj sur la kultura kampo de la Esperanto-movado. La invitinto estis eldonisto T. Kehlet. La direktoro de Stafeto, prof. J. Régulo Pérez, alparolis siajn kunlaborantojn per vortoj samtempe dignaj kaj emociaj.

Aliaj Eventoj: Okazis kompreneble diversaj aliaj eventoj sur la kampo de kulturo, ĉu sub la egido de UEA, ĉu sendepende. Ekzemploj estas: la 10a Pupteatra Internacia Festivalo (Zagreb), la 15a Somera Esperanto-Universitato en Gyula (Hungario), la daŭra aktiveco de la Teatro Esperanta de Parizo (TESPA), la fondiĝo de (kaj sukcesa ekspozicio fare de) pentrista Esperanto-grupo en Osako, kaj multaj aliaj. Someraj Universitataj Kursoj (SUK) estas planataj ankaŭ por aŭgusto 1978. Ili okazos en Lieĝo (Belgio), kun lekciroj pri astronomio, psikologio kaj literaturo. Entute, oni povas diri, ke la multfaceta agado sur la kampo de kulturo daŭras kontentige. Espereble oni sukcesos ankoraŭ plivastigi kaj plikoherigi ĝin iom post iom dum la venonta jaro.

B. Edukado

Oni refunkciigis en nova aranĝo la Konstantan Komisionon pri Edukado, kiun eniris R. Triolle (Francio), T. Tyynelä (Finnlando), G. Leon-Smith (Britio), C. Minnaja (Italio), A. Pettyn (Pollando; la gvidanto de la Komisiono), kaj flanke de ILEI — O. Hoekstra (Nederlando). Oni ellaboris agadplanon pri edukado (vidu en la revuo *Esperanto*, februaro 1978). La Komisiono komencis vigle labori kaj jam atingis la unuajn laborrezultojn. Estas pretaj: "Konsiloj por la memlernantoj de Esperanto" kaj "Instruprogramo de Esperanto por plenkreskuloj" (triŝtupa), kiun landaj esperantistaj organizaĵoj (ne disponantaj pri la propraj instruprogramoj) povos facile adapti por siaj bezonoj. Laŭ la antaŭvidoj la agado en la sfero de edukado plene disvolviĝos post la Kongreso en Varna, kies ĉeftemo estas "Internacia lingvo — Internacia edukado".

11. JUNULARA SEKCIO

(Tutmonda Esperantista Junulara Organizo)

(1) **Estraro:** Post la novelektoj en Poitiers forlasis la Estraron C. Nourmont-Moon, M. Korniluk, R. Krips, J. Sly, W. Żelazny, T. Vaskó, K. Schubert kaj Paul Peeraerts. Eniris ĝin Gert van Tongerloo (Belgio), Thomas Bormann (FR Germanio), Floreal Gabalda (Francio), Miguel Gutiérrez Aduriz (Hispanio), Giulio Cappa (Italio), Csaba Lendvay (Hungario) kaj Amri Wandel (Israelo). Spuras de la antaŭa gvidantaro Savas Tsiturides, kiu transprenis la prezidantecon, Brunetto Casini kaj Stefan MacGill. La estraro establis la principon kunveni trifoje jare per kunvenoj en Poitiers (Francio, aŭg. 1977), Rotenburg (FR Germanio, jan. 1978) kaj Jezolo (Italio, marto 1978).

(2) **Komitato:** Dum siaj kunsidoj en Poitiers la komitato unuafoje starigis konstantajn komisionojn pri: celoj, eksteraj rilatoj, regiona agado kaj varbado. Ili agadas dum la tuta jaro sub la gvido de po unu estrarano. Komence de 1978 landaj sekcioj nomis siajn A-

komitatanojn, tiel ke la Komitato nun nombras 41 A-, 4 B-, kaj 7 C-komitatanon.

(3) Dokumentoj: Delonge estas faritaj laboroj por nova statuto de TEJO. En Poitiers la Komitato povis decidi pri proponteksto, kiu nun atendas aprobon de la UEA-komitato, kiel ankaŭ novaj kongres- kaj komitat-regularoj, kiuj jam estas aprobitaj de la TEJO-komitato per poŝta voĉdono.

(4) Individua membraro: La membraro en la kategorioj MJ-K kaj MA-K kreskis je 10 procentoj de 274 en 1976 al 308 en 1977. La aldono de 34 junaj dumvivaj membroj donas al TEJO individuan membraron de 341 gejunuloj en 45 landoj por 1977. Atentindas la aliĝoj de la novaj membroj por 1978 ĝis la fino de marto ĉi-jare: pli ol la duono venas el ekster Eŭropo.



(5) Landaj sekcioj: Dum la kongreso en Poitiers la Komitato akceptis la aliĝon de du novaj landaj sekcioj (Finnlando kaj Kanado). La nombro de la sekcioj do kreskis al 30. En julio 1977 aperis 36-paĝa raporto kiu detaligis la strukturojn kaj laborojn de 18 el la landaj sekcioj. Tio provizis la bazon por pli funda enketado pri membronombroj, kies rezulto aperis en *Koncize* (n-ro 19). Tiu raporto konkludis, ke la landaj sekcioj havas ĉ. 9 000 membrojn malpli ol 26-jarajn kaj 12 000 senkonsidere de la aĝo. El la 9 000, TEJO momente ricevas filiigkoton por ĉ. 5 000. TEJO kunlaboras kun la CO por reguligi la junajn Asociajn Membrojn kaj rilate al tio aperos en la Jarlibro 1978 pli detalaj informoj pri la landaj sekcioj kaj iliaj membronombroj. Inter la plej grandaj sekcioj estas tiuj en Belgio, Brazilo, Bulgario, FR Germanio, Hispanio, Hungario, Italio, Jugoslavio, Pollando kaj Svedio.

(6) Servoj: Aperis nova kajero de 'Pasporta Servo', kiu listigas 300 gastigantojn en 40 landoj, pretaj helpi al vojaĝemaj junuloj. Ankaŭ ĉi tie ni rajtas ĝoji, ĉar antaŭ du jaroj la listo ampleksis nur 80 gastigantojn. La 'Turisma Servo' eldonis novan jaran kalendaron kun listo de 130 aranĝoj en 23 landoj. Estas nur bedaŭrenda, ke la organizantoj de aranĝoj en okcidentaj landoj ne pli efike uzas ĉi tiun informrimedon, kiun TEJO al ili provizas. En la Jarlibro 1978 estas listigitaj 63 junularaj delegitoj. Kompare kun 1977 tio estas kresketo je 5%.

(7) Kongresoj: Kun preskaŭ 300 partoprenantoj la 33a IJK en Poitiers (Francio) estis sukcesa manifestacio, kiel pruvas la reago de la gazetaro. La junuloj profunde esploris la temon "Perspektivoj por junulara movado" en diversaj laborgrupoj kaj liveris al TEJO novajn valorajn instigojn. Ĉi-jare la IJK okazos en Veliko Tarnovo (Bulgario) por okupiĝi pri la temo "Esperanto kaj interjunulara amikeco". La TEJO-estraro per decido en Jezolo akceptis la inviton de Nederlanda Esperanto-Junularo okazigi IJK en 1979 en Austerlitz, apud Utrecht. Alvenis invitoj por IJK en 1980. Sed per la okazigo de IJK ne finiĝas la kongresa agado de TEJO. Sinprezentoj de la Organizo estis aranĝitaj okaze de la 62a UK en Rejkjaviko, 21a IS en Rotenburg kaj 2a IJF en Jezolo, por informi la

publikon pri la laboroj de TEJO. Krome, okazis multaj aliaj kunvenoj organizitaj de landaj sekcioj, interalie en Brazilo.

(8) Eldonaĵoj: Malgraŭ dufoja ŝanĝo de ĉefredaktoro la revuo de TEJO daŭre paŝas al ĝisdatigo. La jar-kolekto por 1977 de *Kontakto* estas la unua depost 1973, kiu sukcesas eviti duoblajn numerojn. Ĝiaj kvar numeroj aperis en 9 monatoj. Gazeta reklamado kaj prezentoj en junularaj aranĝoj ĉefas en la kampanjo




varbi pli da abonantoj. Ankaŭ estis starigita la ebleco de kolektivaj abonoj, interalie al netranspagipovaj landoj. La novaj redaktoroj volas larĝigi la reton de kunlaborantoj kaj kuraĝigi verkajn intervenojn de la legantaro. Alia eldonaĵo estas *Koncize*, komuna revuo de TEJO, KER kaj kvin landaj sekcioj. Ĝi regule aperis ĉiun duan monaton, en eldonkvanto de pli ol 1 000 ekzempleroj, liverante aktualajn informojn al junuloj tra la tuta mondo. "TEJO-paĝo" en la revuo *Esperanto* aperis preskaŭ regule. *Info* estis dufoje eldonita post la IJK por informi la individuan membraron pri gravaj TEJO-novaĵoj.

(9) Varbado: La dumkongresa rekorde vizitita sesio "varbumo" donis siajn unuajn fruktojn per aparta plibonigo de la varbaj agadoj kaj privarabaj diskutoj, gvidataj de speciale por tiu fako elektita estrarano. Pro la elĉerpiĝo de la faldfolio "Oslando" nun aperis dua, kun aliĝilo por TEJO, titolita "Kunvenoj" en 5 000 ekzempleroj. Estas pretigata A3-formata afiŝo samtitola. Por la estonta varbado havas prioritaton re-viziitaj nacilingvaj tradukoj de "Kunvenoj". Represo

de la rapide elĉerpiĝinta lernilo *Ĉu vi parolas tendare?* estas konsiderata.

(10) Regiona agado: La ĝenerale vigliganta junulara movado montris apartajn sukcesojn en Sud-Ameriko. Por subteni tion la Komitato de TEJO en Poitiers elektis estraron, kiu speciale okupiĝas pri la aktivadoj en tiu parto de la mondo. Post kiam la konataj faktoj kaj adresoj estis kompilitaj en raporton, ĝi estis sendita al 40 sudamerikaj adresoj. El la reagoj estis



verkita pli ampleksa, aktuala raporto. Tiu laboro daŭras kaj jam montris unuajn fruktojn. La LS en Brazilo aktive informas pri TEJO kaj lastatempe aktivas multaj junuloj en Sud-Ameriko.

(11) Eksteraj rilatoj: Por refreŝigi la Komisionon pri Eksteraj Rilatoj (KER) la nova estraro pri tiu fako (helpe de reagoj al cirkuleroj) listigis la ĉefajn taskojn de KER. Estas kaj restas gravaj la ekzisto de oficejo kaj deĵoranto, regula partopreno de internaciaj aranĝoj (ankaŭ de neesperantistaj junularaj organizoj). Aldoniĝis al tiu listo la helpo al UEA en la agado ĉe Unesko. Jam estas ekfaritaj paŝoj por efektiviĝi tiujn decidojn. En diversaj junularaj informbultenoj aperis raportoj pri TEJO, interalie en tiu de Unuiĝintaj Nacioj. TEJO dum la pasinta jaro reprezentigis ĉe kelkaj internaciaj junularaj aranĝoj, ekzemple en Alĝero, kie temis pri kultura imperiismo, en Parizo en junulara konsultiĝo de Unesko, kaj en Budapeŝto ĉe konferenco pri malarmado. Por 1978 elstaras la partopreno de TEJO-delegacio en la 11a festivalo de mondaj junularo kaj studentaro en Havano.

(12) Konkludo: Administraj firmigoj, intensigo de junularaj aranĝoj, eklaboro de la novaj komisionoj, esploroj pri la financoj de TEJO kaj pli longvida planado por la IJK estas ĉiuj konstateblaj. La venonta IJK aŭguras la longe porpledatan plibonigon de la kontaktoj inter niaj okcident- kaj orient-eŭropaj membroj. La brazila junularo elstaras en la ekstereŭropa kampo. La pasintjara konkludo de ĉi tiu sekcio verdiktis, ke 1976 estis jaro en kiu ne multe videblis en TEJO, sed en kiu estis establita bazo el kiu povos kreski pli vigla agado. En 1977/78 ni komencis vidi tiun kreskon.

12. LANDA KAJ FAKA AGADOJ

A. Landa agado

La centraj instancoj de UEA daŭrigis sian kunlaboron kun la landaj asocioj. Estis vigla korespondado kaj elstaras la bone vizitita kunsido de respondeculoj de landaj movadoj dum la Universala Kongreso, kie la funkciuloj reciproke pliklerigis sin pri metodoj de enlanda laboro. Daŭris ĉefe du klopodadoj: ligi pli da landaj asocioj tute firme al UEA, kiel 'aliĝintaj landaj asocioj', kaj kunhelpi en la plifortigo de ekstereŭropaj movadoj. Al tiu ĉi celo kontribuas nun ankaŭ la fakto, ke estraro ne loĝanta en Eŭropo (s-ino Ursula Grattapaglia el Brazilo) transprenis tiun pozicion en la Estraro de UEA, de kie iras la ligoj al la landaj movadoj.

"Por ke asocio estu vere universala, ne sufiĉas nomi ĝin tia!" Sur la spuroj de tiu konstato jam de kelkaj jaroj UEA, pere de estraroj kaj komisiitoj, klopodas ekstereŭropigi la Movadon, kaj tiu tendenco plivigliĝis post la UK en Islando. Oni starigis Komisionon pri Landa kaj Regiona Agadoj kun jena konsisto: s-ro Amador Diaz agas en la Okcidenta Eŭropo, s-ro Hristo Gorov agas en la Orienta Eŭropo, s-ro Hukunaga agas en la Orienta Azio kaj Oceanio, s-ro William Harmon agas en Nord-Ameriko, s-ro Renato Corsetti agas en Afriko kaj la Okcidenta Azio. La laboro de la komisiono estas kunordigata de la ĉi-faka estraro, kiu samtempe zorgas pri la agado en Sud-Ameriko (vidu *Esperanto*, februaro 1978). Tiu strebado al universal-eco konkretigis per jenaj rezultoj:

Ses novaj landaj asocioj petis aliĝon al UEA: Portugalio, Meksikio, Venezuelo, Peruo, Ĉilio kaj Pakistano; krome, kontaktoj estas starigitaj kun la nova estraro de Brazila Esperanto-Ligo cele al ĝia realiĝo al UEA.

La 1-a Latinamerika Kongreso de Esperanto okazos en Brazilo (urbo Marília) de la 17a ĝis la 22a de julio 1978. La manifestacio al kiu aliĝis ĉ. 600 personoj el 12 landoj, celas starigi novan kunlaboran strategion por nia Movado en tiu mondparto, lige kun la klopodoj de UEA atingi konsultajn rilatojn kun la Organizaĵo de Amerikaj Ŝtatoj (sidejo en Vaŝingtono, Usono).

En Azio, Japana Esperanto-Instituto estas konstruanta novan sidejon. En Koreo la Movado aktivis. En la kampo de personaj kontaktoj elstaras la vojaĝo de d-ro Victor Sadler al Irano, kie la ideo pri internacia lingvo vere furoras (vidu *Esperanto*, decembro 1977).

Paralele kreskas en Eŭropo nia penetro en la instancojn de EK pere de la Eŭropa Esperanto-Centro. Nia agado en la naciaj parlamentoj pliriĉiĝis per nova interparlamentara grupo de amikoj de Esperanto, starigita en Italio.

El 135 Esperanto-manifestacioj aranĝataj en la mondo dum 1978, kaj pri kiuj ekzistas informoj, **130** okazis kaj okazos en Eŭropo! Jen plia pravigo de nia intenco dediĉi maksimuman atenton al la ekstereŭropa Movado, por mildigi tiun malekvilibron.

B. Faka agado

En ĉi tiu laborperiodo aldoniĝis 2 pliaj kunlaborantaj fakaj asocioj — vidu ĉap. 2 (7). Intertraktoj pri kunlaboro kun unu plia neneŭtrala asocio daŭris dum la jaro kaj nun atendas voĉdonon de la Komitato.

Krome okazas preparoj por fondo de kelkaj pliaj fakaj asocioj. Kiel kutime kvar asocioj aranĝis proprajn kongresojn: IFEF (fervojistoj) kongresis en Britio, LIBE (blinduloj) en Norvegio, KELI (kristanoj) en Skotlando kaj IKUE (katolikoj) en Pollando. Ĉiuj aliĝintaj fakaj asocioj, ĉiuj kunlaborantaj neneŭtralaj kaj preskaŭ ĉiuj kunlaborantaj fakaj asocioj kunvenis dum la UK. En Rejkjaviko okazis asembleo de la fakaj asocioj, kiu i.a. decidis aperigi bulteneton *Interfake*, kie la fakaj asocioj povu interŝanĝi spertojn kaj ideojn; la unua numero aperis en decembro 1977.

Elstaras la aktiveco de la matematikista asocio, kiu per ampleksa franclingva artikolo en la revuo de la Asocio de Francaj Matematik-Instruistoj vekis grandan intereson pri Esperanto en matematikistaj medioj; tio rezultigis alfluron de multaj novaj membroj, kaj belga franclingva revuo *Matematiko kaj pedagogio* proponis kunlaboron kun la revuo *Matematiko translimen*. Ankaŭ la ŝakludantoj raportas pri granda ŝakaranĝo okaze de la fondiĝo de Esperanta Ŝakgrupo Hungara, kiu rezultigis grandan alfluron de novaj membroj, kaj pri regulaj truniroj inter la membroj. *Scienca Mondo*, la revuo de la Monda Federacio de Sciencaj Laboristoj, daŭre aperadis ankaŭ en Esperanta eldono.

La medicinistoj okazigis Internacian Medicinan Esperanto-Konferencon en Krakovo. La skoltoj daŭrigas sian grandan internacian kampanjon. La poŝtistoj daŭrigas siajn klopodojn por akceptigi Esperanton kiel laborlingvon de la Universala Poŝta Unio. La kristanoj okazigis studkonferencon en Svedio. Pluraj fakaj asocioj (matematikista, sciencista k.a.) daŭrigas terminologiajn laborojn. Someraj Universitataj Kursoj (SUK) ne okazigis sesion en 1977, sed planas novan sesion en 1978. Ĝi daŭrigas eldonadon de fakliteraturaj kajeroj.

13. ESPLORO KAJ DOKUMENTADO

La Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED) plue laboris en 1977/78 sub gvido de sia tripersona estraro: d-roj D. Blanke (GDR), U. Lins (FRG) kaj J. Pool (Usono). Dum la UK en Rejkjaviko tuta antaŭtagmezo estis dediĉita al diskutkunveno pri la agado de CED (v. *Esperanto*, sept. 1977).

(1) Eldonaĵoj de CED: La revuo *Lingvaj problemoj kaj lingvo-planado* (LPLP), la posteulo de *La monda lingvo-problemo* (LMLP), nun firme establiĝis. Dum la jaro aperis tri numeroj (do la kompleta unua volumo), sub redakto de prof. Richard Wood. La unua numero kaj parto de la dua estis dediĉitaj al simpozio pri lingvaj problemoj kaj lingvo-planado en la Britaj Insuloj. Aperis ankaŭ artikoloj pri la lingva situacio en Svislando, Nederlando, Kanado, Hinda Unio ktp. kaj pluraj recenzoj. La artikoloj estis en kvar lingvoj, ĉiam kun Esperantaj resumo. La Redakta Komitato de LPLP estas nun kompleta. Ĝi enhavas preskaŭ ĉiujn renomajn specialistojn sur la kampo lingvo-planado kaj socilingvistiko, kaj donas al la Internacia Lingvo konsiderindan prestiĝon. LPLP estas daŭre eldonata de la konata eldonejo Mouton. Ankaŭ *Novajletero por interlingvistoj* aperis dum la jaro, sub redakto de d-ro Lins. La libro de d-ro J.C. Wells, *Lingvistikaj aspektoj de Esperanto* aperos post kelkaj monatoj.


(2) Konferenco pri esperantologio: En la kadro de la UK en Varna okazos ampleksa konferenco, organizita de CED, pri esperantologio. Specialistoj el pluraj landoj kontribuos al la programo, kiun prizorgas d-ro Blanke.

(3) Esperanto-dokumentoj: La anglalingvaj kaj Esperantaj serioj daŭre aperis dum la jaro, kaj aldoniĝis la unuaj du kajeroj en la franca. Inter la aperintaj dokumentoj estas menciindaj studo de I. Gál pri lernado de Esperanto fare de pensiuloj kaj aĝuloj, esploro de la lingva karaktero de Esperanto verkita de C. Piron, kaj eseo pri Esperanto kaj la t.n. eŭropaj lernejoj de H.X.L. Drabs. Dokumentoj pri UEA kaj Esperanto estis sendita al ĉiu ricevinto de la teksto de la kongresa parolado de s-ro M'Bow.

ESPERANTO-DOKUMENTOJ

EN TRI DIVERSLINGVAJ SERIOJ:
ANGLA, ESPERANTA KAJ FRANCA

Dum la pasintaj du jaroj, en la tri serioj de ĉi tiu eldonaĵo de UEA aperis entute 24 dokumentoj: 12 en la angla, 2 en la franca kaj 10 en Esperanto. La nomo "dokumentoj" ne tute klare aludas la enhavon de la eldonaĵo. Multaj el la "dokumentoj" estas fakte ampleksaj studoj kaj ne simple statistikaj resumo de okazintaĵoj. *Esperanto-dokumentoj* estas pli interesa kaj utila legaĵo ol vi emus supozi. Provu do aboni unu el la serioj! Abono al dek sinsekvaj numeroj en unu el la serioj kostas 27,50 guldenojn. Por via orientiĝo ni diru ankaŭ, ke la dek kajeroj de la Esperanta serio ampleksas 125 paĝojn. La abonojn akceptas ĉiuj kotizperantoj de UEA kaj, kompreneble, ankaŭ la CO.



Lingvaj problemoj kaj lingvo-planado

Ĉi tiun internacian kaj interfakan revuon publikigas Mouton, ĉefa lingvistika eldonejo en la mondo, kaj aŭspicias CED. "Lingvaj problemoj kaj lingvo-planado" (LPLP) devas interesi esperantistojn pro du kialoj: Ĝi amplekse resumas ĉiun artikolon en Esperanto; ĝi pri-traktas ĝuste tiujn sociajn problemojn, kiujn esperantistoj prilaboras (lingvajn diferencojn, lingvajn barojn, lingvan diskriminacion kaj lingvo-planadon – la konscian kaj sistemecon solvodon de lingvaj problemoj).

La abonprezo estas 33,00 (por Nederlando 34,32) gld. Abonebla ĉe ĉiuj kotizperantoj de UEA kaj ĉe la CO de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam. La abonprezo rilatas al unu volumo (tri numeroj). Nun aktualas abonoj por la volumo 2.

**LPLP: POR KOMPRENI LA SOLVON
ONI DEVAS KOMPRENI LA PROBLEMON!**

(4) **Aliaj agadoj:** La enpenetro de Esperanto en la universitatajn kaj esplorajn mediojn, jam notita pasintjare, daŭras. Inter la konataj fakaj periodaĵoj, kiuj lastatempe portis artikolojn pri esperantologio aŭ interlingvistiko troviĝas *La linguistique* (artikolo de F. Lo Jacomo), *Zeitschrift für Phonetik, Sprachwissenschaft und Kommunikationsforschung* (artikolo de D. Blanke), kaj *Foreign Language Annals* (artikolo de T. Goodman). Aperis ampleksa interlingvistika verko en la hungara de prof. I. Szerdahelyi, *Bábel-töl a világnyelvig*; oni publikigis novan eldonon de la franc-lingva verko de P. Janton *L'espéranto*, kaj aperis kvara, multe ampleksigita eldono de la anglalingva bibliografio de H. Tonkin, *Esperanto and International Language Problems*. Okazis dum la jaro kelkaj konferencoj kaj aliaj renkontiĝoj, en kiuj estis traktitaj Esperanto kaj lingvaj problemoj. Inter estontaj tiaj aranĝoj estas menciindaj la Unua Interlingvistika Kongreso, kiu okazos ĉe la Universitato ELTE en Budapeŝto inter la 24a kaj 28a de julio, kaj la 9a Monda Kongreso de Sociologio (Uppsala, Svedio, de la 14a ĝis la 19a de aŭgusto), kiu inkluzivos sekcion pri "Lingvo kaj internaciaj rilatoj".

14. FINAJ VORTOJ

Dum la jaro, pri kiu temas tiu ĉi raporto, finiĝis la oficperiodo de tiu Estraro de UEA, kiu estis elektita en 1974. Siatempe la elektoj vekis fortan atenton. Neniam en la postmilita tempo la esperantistoj rigardis sian novan Estraron kun tiom da duboj unuflanke kaj da espero aliflanke, kiel en la jaro post Hamburgo. Ses novaj, inkluzive de nova prezidanto d-ro Tonkin, kaj du malnovaj estraranoj garantiantaj kontinuecon sukcesis redoni al la esperantistoj la konvinkon, ke ilia

afero estas en bonaj manoj. Tial la Universala Kongreso en Kopenhago 1975 estis aparte grava: ĝi fariĝis demonstracio de konfido kaj de unueco. Neniam paralelo konstruiĝis al la universala asocio de Esperanto. Ateno 1976 kaj Rejkjaviko 1977 estis novaj mejloŝtonoj je la vojrandoj de la Internacia Lingvo paŝanta antaŭen.

Tiu progreso de Esperanto okazas en mondo subigita al esencaj ŝanĝoj: kiam UEA post la dua mondmilito komencis sian novan etapon la 28an de aprilo 1947, kelkaj okcidentaj ŝtatoj, Usono, Britio, Francio kaj iuj malgrandaj eŭropaj, direktis la mondon, kaj la kunvenkinta Soveta Unio ekrolis en la monda politiko. Nun la nombro de la potencoj estas multe pli granda. Kvankam industriŝtatoj aliĝis al la decidantoj en mondaj aferoj, kiel Japanio kaj FR Germanio, estas la ŝtatoj de la Tria Mondo, kiuj laŭte kunparolas pri la estonteco de la mondo apud la okcidenta kaj la socialisma grupiĝoj. En tiu kalejdoskopio UEA devas el sia pozicio de neŭtraleco antaŭenpuŝi la batalon kontraŭ lingva diskriminacio, do senteble enmiksi sin en ĝeneralan diskuton pri la plej taŭga vojo venki tiun ĉi grandan politikan problemon. Ke ni estas sur la ĝusta vojo, tion pruvas du faktoj: la esperantistoj subtenas la koncepton de UEA pri ĝia partopreno en mondaj aferoj, kaj neesperantistaj instancoj agnoskas nian agadon kiel faris la ĝenerala direktoro de Unesko en Rejkjaviko.

Dum la Universala Kongreso 1977 en la ĉefurbo de Islando kvar personoj el la Estraro elektita en Hamburgo forlasis siajn postenojn kiel estraranoj: la tiama ĝenerala sekretario s-ro Wensing, la longjara financ-estrarano s-ro Woessink, kaj la du estraranoj d-ro Denoël kaj s-ro Świstak. La Movado ŝuldas al ili multan dankon, kaj la Estraro de UEA elparolas tion ĉi tie. Ne estis problemoj en la nuna UEA denove trovi kapablajn homojn por transpreni la liberiĝintajn poziciojn. Eĉ se la ĝenerala evoluo de la membrocifero certe ne povas kontentigi, la rondo da aktivuloj, spertuloj laboremaj kaj sindonaj, estas granda kaj kreskas konstante. La Estraro de UEA elektita dum la raportjaro estas juneca: la aĝoj proksimas al kvardek vivojaroj; ĝi estas varia laŭ mondopartoj (du membroj loĝas ekster Eŭropo) kaj ĝi enhavas kaj virinojn kaj virojn.

La Estraro de UEA taksas la laborojn ankaŭ en la periodo de aprilo 1977 ĝis aprilo 1978 pozitivaj. Kiel montras tiu ĉi estrara raporto, multaj iniciatoj estis entreprenitaj, kelkaj sukcesoj atingitaj kaj la afero de Esperanto antaŭenportata. La Estraro jam verkis por sia nuna oficperiodo planon pri prioritataj taskoj por atingi novajn progresojn per koncentritaj fortoj (vidu *Esperanto*, majo 1978, p. 91). Kune kun la membroj de UEA ĝi plenumos estonte same kiel en la raportjaro siajn devojn laŭ la Statuto de la Asocio: "disvastigi la uzadon de la Internacia Lingvo Esperanto" kaj "plifaciligi la ĉiuspecajn spiritajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj, sen diferenco pri nacieco, raso, religio, politiko aŭ lingvo".

Financaj aldonaĵoj al la Raporto

(Ĉiuj sumoj estas en nederlandaj guldenoj)

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO SPEZOJ POR LA JARO 1977

KOSTOJ	Buĝeto	Rezultoj
Salajroj malnete	169 500	171 402,30
Sociaj asekuroj pagataj de UEA	37 300	33 127,97
Minus kompensoj pro malsano	- 1 800	- 3 713,00
Salajroj, nete	205 000	200 817,27
Afranko kaj telefono	18 300	20 498,31
Presajoj	6 500	4 446,19
Materialoj	6 000	6 861,81
Riparo de maŝinoj	4 000	2 390,41
Revizoroj, trinkaĵoj k.a.	1 600	2 727,15
Juraj kostoj	—	3 328,00
Oficejo, nete	36 400	40 251,87
Fotokopiado	7 000	6 020,88
Minus vendoj de fotokopioj	- 5 000	- 2 312,69
Fotokopiado, nete	2 000	3 708,19
Gasoj, elektro, akvo	5 500	4 705,79
Riparoj, purigiloj	3 800	2 728,95
Asekuro kaj impostoj	2 600	1 722,41
Minus lupago pro ĉambroj	- 720	- 1 463,61
Oficeja domo, nete	11 180	7 693,54
Preskostoj "Esperanto".	32 700	30 940,35
Sendokostoj	28 650	30 510,31
Kovertoj	3 000	2 158,88
Minus anoncoj	-12 000	- 9 377,31
"Esperanto", nete	52 350	54 232,23
Preskostoj de la Jarlibro	14 400	12 908,00
Sendokostoj de la Jarlibro	5 400	4 406,19
Kovertoj	700	1 681,88
Minus anoncoj	- 7 000	- 7 221,14
Jarlibro, nete	13 500	11 774,93
Preskostoj "Kontakto".	4 900	4 549,00
Sendokostoj k.a. kostoj	2 400	3 082,31
Minus anoncoj	—	- 115,80
"Kontakto", nete	7 300	7 515,51
Unufojaj eldonaĵoj	—	3353,00
Veturkostoj oficejaj	1 800	5 083,32
Vojaĝkostoj kongresaj	12 000	13 692,88
Vojaĝkostoj estraraj	9 500	8 043,23
Reprezentaj kostoj		

Komisionoj kaj komisiitoj	2 000	148,00
Vojaĝ- kaj restad-kostoj	25 300	29 189,05
Volontula Servo	15 000	5 492,33
Korespondado estrara k.a.	8 000	7 517,40
Bankkostoj kaj kurzdiferencoj	3 500	4 614,95
Premioj kaj donacoj	700	2 115,81
Postpagitaj kaj diversaj kostoj	1 500	1 362,51
Ĝeneralaj kostoj, entute	5 700	8 093,27
Deprezo de la domo, ĉ. 1%	1 400	1 400,00
Deprezo de maŝinoj, ĉ. 10%	8 000	8 261,35
Deprezoj, entute	9 400	9 661,35
Gajno por 1977	—	444,91
Finsumo	391 130	389 744,85

RIMEDOJ	Buĝeto	Rezultoj
Kotizoj MJ	17 700	17 449,50
Kotizoj MA.	164 500	165 677,35
Kotizoj MJ-K	300	1 749,70
Kotizoj MA-K	10 000	7 560,35
Individuaj membroj sume	192 500	192 436,90
Asociaj membroj UEA	24 000	23 630,58
Simplaj abonoj "Esperanto"	5 400	5 162,29
Kolektivaj abonoj "Esperanto"	21 500	24 410,00
Kongresaj abonoj "Esperanto"	6 000	7 376,08
Abonoj "Kontakto".	2 400	2 140,64
Societo Zamenhof	22 000	21 501,06
Kotizoj de fakaj organizaĵoj	1 300	855,68
Kotizoj entute	275 100	277 513,23
Donacoj al la Ĝenerala Kaso	6 000	8 372,11
Vendoj de la libroservo	146 000	131 632,10
Minus kostoj de la varoj	-111 200	- 89 590,69
Minus katalogaj kostoj	—	- 9 995,00
Triono de sendokostoj	4 900	3 661,61
Libroservo, nete	39 700	35 708,02
Abonservo, nete	3 000	1 649,82
Grafikaj laboroj	26 000	12 969,91
20% de UK-kotizoj	17 000	23 710,12
50% de licencpago de IJK	1 000	3 611,03
Kongresoj, entute	18 000	27 321,15
Turismaj aranĝoj	2 000	1 158,45
Rento, nete	10 000	9 531,29
Diferencoj de antaŭaj jaroj	—	3 135,73
Uzitaj poŝtmarkoj k. diversajoj	1 080	641,69
Ĝeneralaj rimedoj, entute	1 080	3 777,42
Kompensoj el kapitalaj kontoj	10 250	9 823,45
Subvencioj ricevataj	—	1 920,00
Kompensoj kaj subvencioj	10 250	11 743,45
Sumo de la rimedoj	391 130	389 744,85

BILANCO DE UEA JE LA 31a DE DECEMBRO 1977

AKTIVOJ	1976	1977
Ordinaraj bankkontoj	54 291,12	9 541,23
Bankaj ŝparkontoj	125 986,00	64 235,62
Poŝtaj ĝirkontoj	11 617,79	27 245,99
Poŝtaj ŝparkontoj	175,53	20 182,55
Kaso kaj respondkuponoj	1 197,04	1 254,21
Monrimedoj entute	193 267,48	122 459,60

	1976	1977
Valorpaperoj	108 665,00	184 517,00
Ricevotaj enspezoj	39 351,49	54 388,18
Antaŭpagitaj elspezoj . . .	9 759,93	11 361,26
Debitoroj	169 677,79	154 518,60
Provizoj libroservaj	159 116,82	148 584,97
Presajoj, materialoj k.s. . .	20 465,95	23 552,68
Provizoj entute	179 582,77	172 137,65
Maŝinoj kaj mebloj	38 882,68	32 758,14
Garantiaj sumoj	130,00	130,00
Domo de UEA, Rotterdam	130 400,00	129 000,00
Tereno Aspremont	1,00	1,00
Sumo de la aktivoj	869 718,14	861 271,43

PASIVOJ	1976	1977
Rezervo, valoro de libroj k.s.	15 000,00	15 000,00
Antaŭricevitaj enspezoj . .	80 505,29	81 322,78
Pagotaj elspezoj	103 156,13	25 936,29
Kreditoroj	189 596,34	177 202,80
Ŝparkontoj de membroj . .	3 978,68	978,68
Fondaĵo Azio-Afriko	755,87	404,61
Fondaĵo Evolulandoj	—	6 603,20
Fondaĵo Canuto	346,03	3 734,01
Konto CED	2 107,67	—
Fondaĵo Enciklopedio	374,17	495,67
Eldona Fondaĵo	688,36	708,36
Financa Programo	53 051,92	56 257,24
Kongresa Rezerva Fondaĵo	21 722,95	26 922,39
Fondaĵo Oficeja Ilaro	5 200,00	5 200,00
Premio Raymond Schwartz	4 304,82	4 304,82
Propaganda Konto	47 514,52	75 010,81
Fondaĵo TEJO	6 098,71	12 565,48
Fondaĵo Agado ĉe UN/Unesko	—	4 792,91
Fondaĵoj entute	142 165,02	196 999,50
Kapitalo Dumvivaj Membroj	261 665,46	277 553,63
Cetera kapitalo	73 651,22	86 277,75
Asocia kapitalo entute . . .	335 316,68	363 831,38
Sumo de la pasivoj	869 718,14	861 271,43

REVIZORA DEKLARO PRI LA JARO 1976

(ricevita post finredakto de la pasintjara raporto)

La subskribinto, S. H. Brongersma, federa imposto-konsilisto en Leiderdorp, per ĉi tio deklaras, ke li per specimenaj provoj kontrolis la administrajn rezultojn pri 1976 de la unuiĝo Universala Esperanto-Asocio.

Tiu kontrolo necesigas la ĉi-sekvajn rimarkojn, kiuj ankoraŭ devos esti librotene traktitaj.

1. En la bilanco, sub "Aktivoj", la saldo de valorpaperoj plialtiĝu je 40 000,— guldenoj pro la aĉeto de nederlandaj ŝtatobligacioj 8¼%, 1976/96, je 40 000,00 guldenoj. Sub "Pasivoj" en la bilanco la sumo de "Pagotaj elspezoj" plialtiĝu je 40 000,00 guldenoj pro la pago de tiuj obligacioj, kiu en la 31-a de decembro 1976 ankoraŭ ne estis okazinta.

2. En 1976 estis uzitaj la servoj de kelkaj volontuloj. Je la kompenso, kiun ricevas tiuj volontuloj, necesas pagi salajrimposton, pensikotizon kaj aliajn asekurkotizojn ligitajn al la pensikotizo, sed ne necesas pagi aliajn sociajn asekurojn.

Je tiu kompenso necesas ankoraŭ transpagi la ŝuldatajn kotizojn por pensio kaj ligitaj asekuroj, t.e. 1 289,87 gld. El tiu sumo eblas ricevi pere de la volontuloj la sumon de 968,24 gld., t.e. la de ili ŝuldataj kotizoj por pensio.

Librotene: en la bilanco, sub "Aktivoj", aldoni 968,24 gld. al la sumo de "Ricevotaj enspezoj", kaj sub "Pasivoj" aldoni 1 289,87 gld. al la sumo de "Pagotaj elspezoj."

La sumo de la gajno, nome 26 544,31 gld., estu malplialtigita per la diferenco, t.e. 321,63 gld., al 26 222,68 gld.

Krome estas kontrolita per specimenaj provoj la librotenado de la kongreso okazinta en 1976 en Ateno.

Sekve de tiu kontrolo li deklaras, ke li renkontis ne niun malĝustaĵon, kaj li tial deklaras sian konsenton pri la ciferoj prezentitaj en la financa superrigardo, kun rezervo pri la ĉi-supraj rimarkoj 1 kaj 2 kaj la respektive farendaj korektoj. *

La 30an de junio 1977

S.H. Brongersma

* Noto de la Centra Oficejo: La korektita bilanco 1976 aperas ĉi-apude paralele kun tiu de 1977.

REVIZORA DEKLARO PRI LA JARO 1977

La subskribinto, S.H. Brongersma, federa imposto-konsilisto en Leiderdorp, per ĉi tio deklaras, ke li per specimenaj provoj kontrolis la administrajn rezultojn pri 1977 de la unuiĝo Universala Esperanto-Asocio.

Krome estas kontrolita, same per specimenaj provoj, la librotenado de la kongreso okazinta en 1977 en Rejkjaviko.

Sekve de tiu kontrolo li deklaras, ke li renkontis ne niun malĝustaĵon, kaj li tial deklaras sian konsenton pri la ciferoj prezentitaj en la financa superrigardo.

La 18an de majo 1978

S.H. Brongersma

REVIZORA RAPORTO

pri la librotenado kaj agado de la CO de UEA dum la jaro 1977 (art. 40 de la Statuto)

Plenumante la artikolon 40 de la Statuto de UEA, ni, subskribintoj T. Boersma kaj P. Peeraerts, komitatanoj-revizoroj, kunvenis la 21-an de majo 1978 en la CO. Ĉeestis la kunvenon ankaŭ d-ro V. Sadler, direktoro de la CO.

Laŭ nia peto la direktoro transdonis kontokartojn kaj pruvilojn de ni libere elektitajn pri kelkaj eroj de la librotenado. Ni funde esploris ilin. Ni ricevis ĉiujn informojn kaj konstatis, ke la librotena sistemo ebligas facile retrovi ĉiujn detalojn tre rapide. Ne montriĝis iu ajn neregulaĵo. La librotenado estas ĝisdata kaj akurate farita.

Refoje ni spertis, ke en la CO estas farite multege da respondeca laboro, kiun la Asocio malfacile povas taksi tro alte.

Ni proponas al la Komitato, ke ĝi malŝarĝu la Estraron pro la financa gvidado de la Asocio en 1977.

De Hoeve kaj Antwerpen,

T. Boersma, P. Peeraerts.

BUĜETO DE UNIVERSALA ESPERANTO - ASOCIO POR LA JARO 1979

KOSTOJ

Salajroj malnete	238 200
Sociaj asekuroj pagataj de UEA	51 600
Minus kompensoj pro malsano	-2 400
Salajroj, nete	287 400
Afranko kaj telefono, nete	23 400
Presajoj	5 100
Materialoj	7 800
Riparo de maŝinoj	2 800
Trinkaĵoj kaj admin. kostoj inkl. revizorojn	3 100
Oficejo, nete	42 200
Fotokopiado	6 000
Minus vendo de fotokopioj	-2 500
Fotokopiado, nete	3 500
Varmigado, lumo, akvo	5 400
Riparo de la domo, purigiloj	3 900
Asekuro kaj impostoj je la domo	2 000
Minus lupagoj pro ĉambroj	-1 700
Oficeja domo, nete	9 600
Preskostoj, "Esperanto"	33 200
Sendokostoj	50 300
Kovertoj k.a. kostoj	3 200
Minus anoncoj	-10 700
"Esperanto", nete	76 000
Preskostoj de la Jarlibro	15 400
Sendokostoj	5 000
Kovertoj ktp.	1 100
Minus anoncoj	-7 200
Jarlibro, nete	14 300
Preskostoj "Kontakto"	5 200
Sendokostoj, banderoloj k.a., minus anoncoj	3 200
"Kontakto", nete	8 400
Veturkostoj oficistaj	6 400
Vojaĝkostoj kongresaj	12 700
Vojaĝkostoj komisionaj	2 100
Vojaĝkostoj estraraj	20 200
Reprezentaj kostoj	2 600
Vojaĝ- kaj restad-kostoj	44 000
Volontula Servo	9 100
Korespondkostoj estraraj	8 600
Bankkostoj, kurzdiferencoj	5 200
Konkursoj, premioj, donacoj, diversaĵoj	4 600
Ĝeneralaj kostoj, entute	9 800
Deprezo de la domo, ĉ. 1%	1 300
Deprezo de maŝinoj, ĉ. 10%	8 000
Deprezoj entute	9 300
Sumo de la kostoj	522 200

RIMEDOJ

Kotizoj MJ (Membro kun Jarlibro)	20 900
Kotizoj MA (Membro-Abonanto)	178 600
Kotizoj MJ-K	1 900
Kotizoj MA-K	8 200
Individuaj membroj, sume	209 600
Asociaj membroj	26 000
Simplaj abonoj "Esperanto"	5 600
Kolektivaj abonoj "Esperanto"	28 200

Kongresaj abonoj "Esperanto"	10 900
Abonoj "Kontakto"	2 300
Societo Zamenhof	23 200
Kotizoj de fakaj organizaĵoj	900
Kotizoj entute	306 700
Donacoj al la Ĝenerala Kaso	6 000
Vendoj de la libroservo	175 000
Minus kostoj	-125 000
Triono de sendokostoj	4 800
Libroservo, nete	54 800
Abonservo, nete	1 700
Grafikaj laboroj	77 500
20% de UK-kotizoj	24 700
50% de IJK-kotizoj	3 700
Kongresoj, entute	28 400
Diversaj turismaj aranĝoj	6 000
Rento, nete	16 800
Vendo de poŝtmarkoj kaj diversaĵoj	4 000
Kompensoj el kapitalaj kontoj	5 300
Deficito	15 000
Finsumo de la rimedoj	522 200

SPEZOJ de la 62a Universala Kongreso de Esperanto, REJKJAVIKO, 1977

KOSTOJ	Buĝeto	Rezultoj
Pago al UEA (30% de kotizoj)	19 655	35 565,18
Repago al helpantoj	1 600	2 426,50
Makleraĵo de perantoj	1 000	3 656,35
Inaŭguro	1 267	1 947,42
Interkona vespero	—	316,51
Teatra vespero	—	5 582,96
Nacia vespero	7 016	2 375,00
Internacia vespero	7 016	5 545,00
Balo	2 540	909,75
Laborkunsidoj	—	2 178,19
Filmprezentoj, k.a.	—	557,25
ISU: honorarioj	1 800	2 500,00
Kongresejo	7 523	11 989,44
Aliĝilo	1 500	1 115,00
Unua bulteno	1 000	13 552,66
Dua bulteno	3 500	3 250,00
Kongresa libro kaj suplemento	7 000	8 305,00
Glumarko	500	800,00
Insignoj	1 500	552,00
Presajoj, fotokopioj	2 000	1 631,45
Materialoj	1 000	1 627,68
Reklamado	2 500	0,00
Gazetara Servo	1 500	1 305,14
Eksteraj rilatoj	—	2 127,05
Afranko	5 000	8 766,84
Telefono, telegrafo	—	665,89
Transporto	500	1 330,30
Veturadoj enlandaj	1 000	0,00
Oficejo	500	0,00
Bankkostoj, kurzdiferencoj	—	- 1 778,67
Diversaĵoj	500	70,97
Gajno	—	59 674,65
Sumo de la kostoj	78 917	178 545,51

RIMEDOJ

Kotizoj	65 517	118 550,61
Ekskursoj, nete	3 000	13 678,17

	Buĝeto	Rezultoj
Bankedo, nete	500	- 898,07
Libroservo	700	0,00
Glumarkoj	1 000	963,91
Anoncoj, reklamiloj	1 000	8 060,70
Subvencioj, donacoj	0	11 488,63
Loĝmakleraĵo	1 000	3 624,69
Postkongreso, nete	6 000	21 229,78
Fakaj kunsidoj	200	355,00
Rento	0	1 454,53
Diversaĵoj	0	37,56
Sumo de la rimedoj	78 917	178 545,51

REKALKULITAJ SPEZOJ

de la 58a Universala Kongreso de Esperanto,
BEOGRAD, 1973

KOSTOJ	Buĝeto	Rezultoj
Pago al UEA: 30% de kotizoj	46 755	27 245,60
Senpagaj aliĝoj (v. rimedojn)	7 800	5 940,00
Repago de kotizoj al helpantoj	3 000	2 754,03
Makleraĵo al kotizperantoj	3 845	1 670,22
Infana kongreseto	7 000	4 003,78
Inaŭguro	6 000	343,90
Interkona vespero	1 000	285,00
Teatra vespero	15 000	1 630,94
Jugoslavia vespero	3 000	—
Internacia vespero	6 000	3 864,25
Balo	6 000	596,79
Junulara vespero	2 000	152,00
ISU kaj festparolado	3 000	1 580,10
Oratora konkurso	600	210,00
Filmprezento	—	76,00
Bankedo	5 000	8 126,59
Kongresejo	15 000	20 217,46
Aliĝilo kaj Unua Bulteno	2 500	2 651,25
Dua Bulteno	3 000	2 204,55
Kongresa Libro kaj suplemento	10 000	6 230,74
Diversaj presaĵoj	3 300	1 109,35
Glumarkoj	1 500	586,00
Insigno (minus vendoj)	3 000	2 479,63
Loĝado	—	16 840,00
Oficejo kaj materialoj	6 000	2 939,56
Reklamado	8 000	489,60
Gazetara servo	3 000	984,07
Afranko kaj telefono	10 000	4 156,08
Transportoj	—	180,94
Veturado en Beograd	—	587,58
Kurzdiferencoj kaj bankkostoj	—	- 270,34
Diversaj elspezoj	3 700	5 464,26
Troa elspezo el la Blindula Kaso	—	872,39
Profito	—	26 766,11
Sumo de la kostoj	185 000	152 968,43

RIMEDOJ	Buĝeto	Rezultoj
Kongreskotizoj	155 832	90 818,60
Senpagaj aliĝoj (v. kostojn)	7 800	5 940,00
Simbolaj aliĝoj	—	177,30
Infana kongreseto	2 000	2 041,60
Ekskursoj (neta gajno)	7 000	1 149,97
Bankedo	5 000	9 151,14
Libroservo	—	1 291,91
Glumarkoj (vendoj)	1 500	1 305,15
Anoncoj kaj reklamiloj	2 000	2 498,00

Subvencioj kaj donacoj	—	14 630,16
Loĝado	—	15 678,40
Loĝmakleraĵoj	2 000	2 855,00
Antaŭkongreso Ljubljana	—	862,81
Postkongreso Ateno (makleraĵo)	—	2 824,30
Diversaj enspezoj	1 868	1 744,09
Sumo de la rimedoj	185 000	152 968,43

KLARIGO pri la rekalkulita spezokonto de la 58a UK (Beograd)

En 1973, la jugoslavia ŝtato asignis al Jugoslavia Esperanto-Ligo subvencion de 170 550 dinaroj pro “partopreno en la kostoj de la okazigo de la 58a Kongreso de esperantistoj en Jugoslavio”, responde al peto de JEL pri disponigo de kvar apartaj sumoj por: 1) kostoj de la kongresejo, 2) parto de la kostoj de vojaĝo de LKK-anoj al la UK en Portland, 3) informado pri la Kongreso, 4) Blindula Kongreso. La ricevitan sumon JEL disdividis proporcie al la kvar sumoj petitaj, tiel ke la Universala Kongreso ricevis 75 700 dinarojn por la kostoj de la kongresejo. La aliaj sumoj ne eniris la kongresajn kontojn.

La Estraro de UEA, aliflanke, opiniis, ke la tuta sumo devus eniri la kongresajn kontojn, tiel ke ankaŭ la elspezo de la tuta sumo estu submetita al la aprobo de UEA. Ĝi sekve proponis al la Komitato en Kopenhago spezokonton de la 58a UK, en kiu la efektivaj spezoj estis altigitaj tiel, ke unuflanke aperis la tuta sumo de la ŝtata subvencio pagita al JEL, dum aliflanke aperis kiel elspezoj la subvencioj al LKK-anoj vojaĝintaj al Portland kaj por la Blindula Kongreso. La cetera parto de la elspezoj — por “parto de materiaj elspezoj por aliaj formoj de la propagando kaj informado pri la Kongreso” — ne estis aprobita de la Estraro kaj ne aperis en la spezokonto. Temis pri sumo de 45 280 dinaroj. Per aliaj vortoj: la Estraro de UEA opiniis, ke tiun sumon ricevis JEL sed devus ricevi la Kongreso. Tiu plialtigita spezokonto aperis en la Estrara Raporto por 1974/75 (p.45-46). En la Kongreso de Kopenhago la Komitato akceptis la proponitan spezokonton sen detala diskuto, sed JEL ne estis antaŭe informita pri ĝi, kaj ne ĉeestis komitatanoj el Jugoslavio.

Tiun spezokonton tamen ne akceptis la Prezidentaro de Jugoslavia Esperanto-Ligo, kaj ĝi postulis, ke aperu nur la sumoj efektive spezitaj de la Kongreso. En la Kongreso de Ateno (1976) la Komitato de UEA akceptis kompromisan rezolucion, per kiu estis akceptita tiu postulo de JEL sed aliflanke estis starigita nova fondaĵo dediĉita al laboro en la Tria Mondo, en kiun JEL enpagis 6603,20 gld. kiel egalvaloron de la pridisputita sumo.

En la kadro de la sekva rekalkulo de la kongresa spezokonto, UEA akceptis postulon de JEL pri aprobo de aliaj, antaŭe neaprobitaj kostoj, sume 1077,11 gld. Tiamaniere la rekalkulita — nun oficiala — spezokonto montras finan profiton de 34 446,42 – 6603,20 – 1077,11 = 26 766,11 gld. Ĉi tiun rekalkulon aprobis la Prezidentaro de JEL.

En la bilanco de UEA je la fino de 1977, inter la pasivoj, aperas la sumo de la nova “Fondaĵo Evolulandoj”, dum aliflanke la sumoj de la Propaganda Konto kaj la Kongresa Rezerva Fondaĵo estas malpli altaj pro la malaltigo de la profito de la 58a UK.

Rumanio

- Telegramo atinginta nin lastmomente (la 2an de junio) anoncas gravan novaĵon pri la Movado en Rumanio. Jen la telegramo: **ESPERANTA SCIENCAKADÉMIA KOLEKTIVO FESTE OFICIALIGITA. ESPERANTO ENKONDUKITA EN FILOLOGIAJN FAKULTATOJN. LETERO SEKVOS. PROF. BOCIORT.** Krom Soveta Unio, Rumanio ĝis nun estis la sola orienteŭropa lando sen oficiale organizita Esperanto-movado. La novaĵo do estas eksterordinare grava, se ne eĉ historia (pro la dua frazo en la telegramo). Pli da informoj en nia venonta numero!

Aŭstralio

- Jam tutan jaron la radio-stacio WAIT (anglalingva mallongigo por: Okcident-Aŭstralio Instituto de Teknologio) en Perth ĉiusemajne dediĉas duonhoran programon al Esperanto. La elsendo konsistas el lecionoj de la radio-kurso *Jen nia mondo* de Grupo Kvin el Britio kaj anglalingvaj intervjuoj kun esperantistoj (ekz. d-ro D. Broadribb intervjuiĝis pri la Akademio de Esperanto kaj pri *Biblia revuo*). Notindas, ke tiuj programoj ne estas senpage elsendataj, sed oni private pagas ilin.

Ĉinio

- En Zagreb (Jugoslavio) finiĝis diskutoj inter la Ambasadro de Ĉinio kaj Internacia Kultura Servo pri partopreno de la Pekina Pupteatra Trupo en la 11a Pupteatra Internacia Festivalo, okazonta en Jugoslavio de la 5a ĝis la 10a de oktobro 1978. La ĉinaj artistoj prezentos en Esperanto la spektaklon *Ribelo kontraŭ la Ĉiela Palaco*, kiu estas adaptaĵo de la unuaj sep ĉapitroj de la klasika ĉina romano *La pilgrimado al la Okcidento*. La spektakla mito el la 16a jarcento prezentigos per surstangaj pupoj kaj celos infanan kaj plenaĝulan publikon.

- Fine de aprilo, Esperanto-Societo de la Katolika Universitato Fu-Jen okupis tutan etaĝon de la Centra Biblioteko en Tajpeo (Tajvano) per ampleksa Esperanto-ekspozicio. La ekspozicion solene malfermis kardi-



nalo Yupin (meze sur la foto), rektoro de la Universitato, kiu antaŭ 40 jaroj mem komencis lerni Esperanton en Budapeŝto. Inter plurcento da invititoj troviĝis multaj elstaraj figuroj, kiuj esprimis tre pozitivajn opiniojn pri Esperanto kaj la ekspozicio, kies ĉefa aranĝanto estis prof. J.B. Se-ĉien Kao.

Hispanio

- La 21an de majo en Cheste okazis la 6a regiona Esperanto-renkontiĝo, kiun partoprenis 200 personoj. Inter la partoprenantoj estis ankaŭ



- Luksemburgo: Landoj aŭ landetoj, en kies Movado aŭ movadeto nenio okazas, malofte menciigatas sur niaj paĝoj. Luksemburgo estas mala kazo: De tie venas amaso da novaĵoj, tiel ke ni konfuzite ne scias kion elekti kaj — aperas nenio. Tamen, jen la senlaca pastro Hansjörg Kindler, pli konata kiel magiisto Triksini, en sia E-klaso ĉe Internacia Akademio Monternah.

s-roj L.M. Hernández Yzal, F. Zaragoza kaj F. Navarro, kiuj prelegis al 300 lernantoj de Esperanto en la Laborista Universitato de Cheste.

Vjetnamio

- S-ro Ngô Chân Lý (539/TK2/20 Trần Hưng Đạo, T.P. Hồ Chí Minh, Vjetnamio) dum la lastaj jaro kaj duono havis 54 lernantojn en siaj Esperanto-kursoj. Lian korespondan kurson dum la sama periodo sekvis 92 personoj, el kiuj duono jam kontentige ellernis Esperanton. Antaŭ du monatoj li komencis eldoni bultenon *Esperanto-novaĵoj*, kiu publikigas tekstojn en la vjetnama lingvo kaj en Esperanto. Helpo per sendo de instrumaterialo estas bonvena.

Soveta Unio

- Inter la 7a kaj 9a de majo en Kievo okazis la 4a Konferenco de Ukrainaj Esperantistoj, organizita de la ĉi-jare oficialiĝinta Kieva Esperanto-Klubo "Ora Pordego". La Konferencon partoprenis 78 delegitoj el 15 ukrainaj lokoj. La ĉeftemoj de la Konferenco estis la instruado de Esperanto kaj preparoj por la planata eldono de *Ukraina antologio*. La Konferenco faris gravan decidon pri reaktivigo de Ukraina Societo de Esperanto-Aktivuloj. Ĉu do temas pri memstara organiza formo por la ukrainaj esperantistoj?

Medicinistoj

- Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA), aliĝinta faka asocio de UEA, festos sian 70-jaran jubileon en la kadro de la 63a UK en Varno, kie d-ro H. Shinoda, honora prezidanto de UMEA, prelegos pri la historio de ĉi tiu asocio, fondita en 1908 sub la nomo Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio (TEKA).

Universitatoj

- Dum aprilo, kiam en Japanio komenciĝas nova studjaro, Rondo Harmonia (studenta Esperanto-organizaĵo) aranĝis informkunvenojn pri Esperanto en pli ol 30 japanaj universitatoj. Sekve de tiu varbkampaĵo, centoj da universitatoj ek-lernis la Internacian Lingvon.
- En la Ŝtata Universitato de San-Francisko (Usono) ankaŭ ĉi-jare, inter la 19a de junio kaj la 7a de julio, okazos la jam tradiciaj someraj Esperanto-kursoj. Ili tamen ne havos ĉi-jare sian "tradician" gvidanton — William Auld, kies lokon ĉi-foje transprenos d-ro David K. Jordan (Usono) kaj mag. Probal Daŝgupto (Hinda Unio). La kursoj estos tri-nivelaj: baza, meza kaj progresiga.

Literaturo

- En la nederlanda literatura revuo *Van* de majo 1978 (jarkolekto 2, numero 9) aperis "Kongresa runo" de Kalocsay kaj "Diluvo" de Ragnarsson en la nederlanda traduko de d-ro W.A. Verloren van Themaat.
- Entuziasma rondo en Kolombio prilaboras Esperantan tradukon de la fama romano *Cent jaroj da soleco* de Gabriel Garcia Márquez, unu el la plej furoraj aŭtoroj en la nuntempa monda literaturo. Se la tradukantoj persistos, ni eble baldaŭ havos en Esperanto tiun "lerno-libron" pri la moderna prozverkado.

Delegita reto

- Nur la ĉefdelegitoj en Francio kaj FR Germanio regule kompilas statistikojn pri la laboro de la delegitoj de UEA en tiuj landoj. Nia revuo jam plurfoje dum la pasintaj jaroj atentigis pri tiuj delegitaj laboroj. Letero de la delegito en la urbo Gorkij en Soveta Unio atentigas, ke la delegita

laboro ofte estas surprize granda: En la unua jarkvarono de 1978 la delegito ricevis 570 korespondaĵojn de 86 homoj el 17 landoj. Dum la sama periodo la delegito ekspedis 520 korespondaĵojn al 104 adresoj. Ĉu ĉi tiuj nombroj ne malaktualigas ĉiam pli ofte aŭdatajn opiniojn, ke la delegita reto estas anakronisma kaj malofte utiligata servo de UEA?

Instruistoj

- La 12a Internacia Konferenco de ILEI okazos en Gorizia (Italio) de la 19a ĝis la 27a de aŭgusto 1978. Informojn petu ĉe: ILEI-Konferenco, Michel Staedter 11, I-34170 Gorizia, Italio.
- En Groningen (Nederlando), kie en du lernejoj estas instruata Esperanto, la 22an kaj 23an de aprilo okazis konferenco de la nederlanda ILEI-sekcio. Partoprenis 45 instruistoj kaj 30 gastoj, inter kiuj estis ankaŭ s-ro H. Sonnabend, prezidanto de ILEI, kaj d-ro R. Höster, regiona ĉefinspektoro pri instruado.

PRO MANKO DE SPACO EN ĈI TIU NUMERO NE APERAS LA LISTOJ DE DONACINTOJ KAJ NOVAJ MEMBROJ DE SOCIETO ZAMENHOF. VI TROVOS ILIN EN NIA VENONTA NUMERO.

Interlingvistiko

- Por kompletigi studon pri publikaj kaj privataj bibliotekoj de Esperanta kaj alia interlingvistika literaturo, s-ro Marinko Ĝivoje (P.p. 5025, YU-41040 Zagreb-Dubrava, Jugoslavio) petas informojn pri tiaj bibliotekaj kolektoj (loko, amplekso, eventuala ekzisto de katalogo ktp.). Temas nur pri kolektoj kun minimume mil volumoj de libroj kaj gazetaj jarkolektoj.

Radio

- Laŭ statistiko, kiun ĉiujare ellaboras s-ro Georges Larglantier, redaktoro de nia radio-rubriko, dum la jaro 1977 okazis entute 2 523 radioelsendoj en Esperanto. La elsendoj de 14 radio-stacioj el 10 landoj daŭris entute 947 horojn.

Persone

Friis

- Post 46 jaroj da aktiveco, en aprilo ĉi-jare s-ro Lorenz Friis transdonis la gvidadon de Dansk Esperanto-Forlag (Dana Esperanto-Eldonejo) al alia, pli juna homo. De post 1932, kiam s-ro Friis fondis la eldonejon, DEF publikigis preskaŭ cent titolojn, pedagogiajn kaj beletrajn, kaj elkreskis en unu el la plej agemaj movadaj eldonejoj. S-ro Friis, kiu la 23an de januaro 1979 fariĝos 75-jara, jam en 1974 fordonis al aliaj sian duan romanon entreprenon, tiun de Internaciaj Esperanto-Kursoj en Helsingør. La nova adreso de la eldonejo

estas Dansk Esperanto-Forlag, Sdr. Allé 29, DK-8000 Aarhus, Danlando.

Lins

- Nia regula kunlaboranto, estrarano de CED kaj komisiito de UEA pri la eldona agado, d-ro Ulrich Lins (FR Germanio), lastatempe translokiĝis al Japanio, kie li dum kelkaj sekvantaj jaroj gvidos germanan registaran oficejon pri interŝanĝoj de universitataj sciencistoj inter Japanio kaj FR Germanio. La nova adreso de d-ro Lins estas: 3-19-6 Den'enchofu, Ota-ku, Tokyo, Japanio; tel. 722-3923.

Aŭgusto ?

Kion fari dum aŭgusto, se oni deziras samtempe ripozi, promenadi kaj — surloke — en ĉarma restadejo ankaŭ lerni aŭ praktiki la Internacian Lingvon? Ni havas bonan proponon! Tuj petu informojn — aldonante respondkuponon — ĉe la sekva adreso: Esperantista Kulturdomo, Kastelo Grésillon, F-49150 BAUGE, Francio. Skribu tuj!

Grésillon !

Nekrologoj

FRANTIŠEK SVITÁK

La 4an de marto forpasis en Prago inĝ. František Sviták (1911-1978), multjara aktivulo en la Esperanto-movado, prezidanto de la antaŭa Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato, ĉefdelegito de UEA, honora membro de Ĉeĥa Esperanto-Asocio.

LUDWIG PICKEL

En Nürnberg (FR Germanio), la 7an de majo mortis Ludwig Pickel (1922-1978). Li aktive eniris la Movadon tuj post 1960 kaj en 1963 fariĝis afergvidanto de Germana Esperanto-Asocio, kies funkciulo li restis ĝis 1971, kiam li transprenis la eldonadon (poste ankaŭ la redaktadon) de *Germana Esperanto-revuo*, en 1975 transformiĝinta al *Eŭropa Esperanto-revuo*. Pickel estis ankaŭ eldonisto de pluraj Esperantaj libroj kaj prizorgis unu el la plej grandaj movadaj librovendejoj. Specifan renomon portis al Pickel lia semajna novaĵbulteno *Pilo-Press*, kiu regule

aperadis ekde 1971 kaj havis ankaŭ sian germanlingvan version. Forlasinte sian prokuroran postenon Pickel dum la lasta jardeko profesie okupiĝis nur pri Esperanto.

ADOLF SPROECK

Post pli ol 70 jaroj en la Esperanto-movado, la 25an de marto forpasis en Berlino Adolf Sproeck (1890-1978). Li estis elstara kursgvidanto, kunlaboranto en pluraj movadaj periodaĵoj, funkciulo en la germana Esperanto-movado, honora membro kaj multjara prezidanto de Esperanto-Ligo en Berlino. En 1969 aperis lia kolekto de satiraj noveloj kaj poemoj *La skurila libro*. Restis en manuskripta formo lia traduko de la kompleta *Faŭsto* de Goethe.

LUDOVIKO MARTON

La 24an de marto en Budapeŝto forpasis d-ro Ludoviko Márton (1922-1978), iama ĝenerala sekretario de Hungarlanda Esperanto-Konsilant-

aro kaj redaktoro de ties *Informilo*. Li havis grandajn meritojn pri la postmilita ligiĝo de la hungaraj esperantistoj al la internacia Esperanto-movado. Márton iniciatis kaj dum pluraj jaroj redaktis la periodaĵon *Internacia jura revuo*, estis vicprezidanto de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj, aktivulo en Mondpaca Esperantista Movado kaj redaktoro de hungaraj eldonoj de la revuo *Paco*.

MILIVOJE VELIČKOVIĆ

Dum la ĉefkunveno de Jugoslavia Asocio de Fervojistoj Esperantistoj, la 29an de aprilo, en Opatija (Jugoslavio) forpasis s-ro Milivoje Veličković (1921-1978), prezidanto de tiu landa sekcio de IFEF, unu el la redaktoroj de la revuo *Jugoslavia fervojisto* kaj fakdelegito de UEA.

IZRAIL G. KUDRJAVICKIJ

Dumviva membro kaj antaŭe peranto kaj vicdelegito de UEA en Moskvo, s-ro Izrail Grigorjeviĉ Kudrjavickij (1910-1978), forpasis la 17an de aprilo. Li lernis Esperanton en 1926.

Anoncetoj

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,75 gld. (1 int. resp. kup.). Pri la enhavo respondecas nur la anoncantoj mem.

Mark Patterson (P.O. Box 903, Wanganui, Nov-Zelando), 17-jara lernanto de scienco kaj lingvoj, interesita pri tiuj temoj kaj teologio, ŝatus kontakti german-, franc-, kaj ruslingvulojn kun similaj intereso.

Optimala Esperanto-Ortografio, laŭetimologia, sen "ĉapelitaj" literoj (aŭtoro: A. Lienhardt). Prezo: 9,00 gld., ĉe la Libroservo de UEA.


Geamikojn de la paco serĉas la sekcio de la Mondpaca Esperanto-Movado en la tuta Federacia Respubliko Germanujo. Skribu baldaŭ al MEM-sekcio en Iggelbach, Schlossgasse 30, D-6731 Elmstein-2, (ĉef-sekretario Roland H. Hegen).

Vojaĝonte al Ĉeĥoslovakio, petu de la CO de UEA cirkuleron kun utilaj informoj.

Bela ekspozicio, aranĝota antaŭ julio, por bibliotekoj, lernejoj, universitato. Klubjubileo 50-jara. Sendu

ĉiuspecajn, ĉiulandajn eksponaĵojn! Priskribanta respondo garantiata. Esperanto-Societo, Älväkersgatan 14, S-653 49 Karlstad, Svedio.

17-jara maroka studento Meski Abdellatif, Sisi Maârouf 1er, rue 75 no. 26, Casablanca, Maroko, deziras korespondi tutmonde.



24-jara amiko deziras korespondi tutmonde: Iraj Javadi, 15 Shahrivar Alley, Mokhtari Station Amirieh Ave., Tehran, Irano.

Aŭstralio, 88 Headingley, Vic. 3149, f-ino Courtenay, deziras ricevadi el la tuta mondo reproduktaĵojn de pentraĵoj en la formo de bildkarto, kontraŭ bildkarto de Aŭstralio. Ankaŭ korespondi kun Francujo, Italujo, Grekujo kaj Hispanujo. Ĉiam respondas.

Lidja Zamenhof — vivo kaj agado. Eldoniston serĉas: Isaj Dratwer, Bat Jam, poŝtkesto 3396, Israelo.

Jaroslav Matvijiŝyn, Kiev, P.B. 157, Soveta Unio, serĉas poŝtmarkojn, bildkartojn, librojn pri pentroarto.

Korespondu ideale per Japana Esperanto-Korespondo-Servo (ĉe KLEG, Sone-higashi 1-11-46-204, Toyonaka-si, 561 Japanio), kiu konstante aktivas, transperas vian propran leteron kunsinprezantan mem laŭ via deziro.

Galja Manova Nikolova, vilaĝo Slaĝtica — 2533, Kjustendil, Bulgario, estas 17-jara gimnazianino, kiu volas havi leteramikojn el la tuta mondo. Korespondas Esperante, angle kaj ruse.



Facila kaj utila helpo

Pro sia profesia okupiteco, multaj homoj, spite al siaj deziroj, ne sukcesas aktivi en la Movado. Ili tamen estas membroj kaj regule pagas siajn kotizojn al diversaj organizaĵoj. Nu, ankaŭ



Kunveno: spontanecaj kaj kunvenoj planitaj. Antaŭ ĉio kunvenoj por junuloj, kunvenoj internaciaj. Jen kio elstaras pri TEJO, la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo kaj pri ĉiuj landaj sekcioj. La foto montras unu el tiuj spontanecaj kunvenoj, kiu okazis kadre de kunveno planita. Temas pri la 31a IJK (Internacia Junulara Kongreso) de TEJO en Fredericia, Danlando en 1975. Tiaj scenoj ofte ripetigas. Ĉiujare IJK le en la mondo kunvenigas inter 250 kaj 400 junulojn el pli ol 25 landoj en unika etoso, kiam ĉi tiuj piej bonaj fotoj povas nur pale kominki. Demandu al regula IJK-ĉeestanto ĉu tio veras. Petu detalojn pri la venonta IJK kaj la aliaj renkontiĝoj kiujn organizas la landaj sekcioj de TEJO.

tejo

tio estas grava helpo al la Movado. Vi eble ne havas tempon varbi novajn membrojn por UEA kaj TEJO, sed vi ja trovos tempon simple disdoni la du belajn informilojn! Mendu ilin ĉe: UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam.


Problemo ne estas tiuj membroj de UEA, kiuj ankoraŭ ne festis sian 26an datrevenon. Ili ja aŭtomate ricevas KONTAKTON pro sia membreco en UEA / TEJO. Problemo do estas vi aliaj, ĉar tiu revuo venos al vi nur, se vi ĝin abonos rekte,

kuraĝe kaj ne ŝanceliĝante. Ĉu fakte necesas fordiĉi pli da vortoj por konvinki vin pri elspezo de nuraj 16,50 (por Nederlando 17,16) gld.?! Se vi hezitos, vi riskas malfrui, kion KONTAKTO apenaŭ plu faras! Jes, imagu! Baldaŭ aperos la unua numero por 1978, kun tekstoj i.a. de Brandenburg, Brennan, Cappa, Corsetti, Cushing (por resti nur ĉe la komenco de la alfabeto).

kontakto

por.
scii
pli

1978



ABZ de amo estas havinda popularscienca verko por ĉiu

Ĉi tiun 274-paĝan enciklopedion de la seksa vivo verkis danaj psikologoj Inge kaj Sten Hegeler, kaj tradukis Ib Schleicher kaj August Weide.

Formato: 25cm. Ilustrita. Bindita per ledumita plasto.

Prezo: 33,78 (por Nederlando 35,13) gld. plus 10% por la sendokostoj.

Mendu ĉe: UEA, Nwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.



Pensu pri beleco

uzante sur viaj korespondaĵoj la allogan trikoloran glumarkon! Cent markoj kostas 8,25 (por Nederl. 9,60) gld., kio inkluzivas la sendokostojn.



Mendu ĉe via landa libroservo aŭ ĉe la Libroservo de UEA, Rotterdam.

KSM


Se vi serĉas seriozajn korespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejoj), turnu vin al la Koresponda Servo Mondskala de UEA. Adreso: KSM, 12, rue des Jacobins, F-63000 Clermont-Ferrand, Francio.

Elĉerpitaj libroj?

Disponeblas binditaj fotokopioj de plurdeko da elĉerpitaj libroj. Petu apartan prezliston de la Libroservo de UEA.

Ĉu vi havas ion por diskonigi al ĉiuj en la Movado?

La plej simpla kaj — konsiderante ĉion — la plej malmultekosta maniero atingi tion estas anonci en nia revuo. Memoru, ke la revuon legas minimume 13 000 homoj en 86 landoj tra la tuta mondo. Vidu nian anonctarifon sur la dua kovrila paĝo.



Dum preskaŭ duonjarcento, la originala poezio de Kalocsay reprezentigis esence nur per *Streĉita kordo*. Nun, fine, *Izolo* prenas sian lokon apud ĝi. La unua eldono de *Izolo* fariĝis praktike kvinekzemplera, pro la militeksplodo en 1939. Ĉi tiu fotorepreso estas farita laŭ unu el tiuj raraj originalaj ekzempleroj.

Eldonis UEA, Rotterdam, 1977. 77p. 18cm. Bindita, kun ŝirmkovrilo. ISBN 92 9017 020 4. Prezo: 16,50 (por Ned. 17,16) gld. + afranko 10%.

je la flanko de la profeto

LA TROFEOJ
LA NEKONATA KONATO
PRIMICO
metropoliteneno

TK, la nuntempe gvida Esperanto-eldonejo, havas ambician planon — ĉiumonate lanĉi novan volumon sur la movada libromarkato. Apude estas nur parto de la realigoj tiurilataj: JE LA FLANKO DE LA PROFETO (33,00 gld.) provas inici la leganton en islamon kaj ĝian kulturon, per esearo de I. Chiussi; LA TROFEOJ (12,00 gld.) estas majstra traduko de la fama sonetaro de J.M. de Hérédia; LA NEKONATA KONATO (6,60 gld.) de D.P. Boatman estas streĉa originala detektivromano, kiun admiris eĉ Kalocsay; PRIMICO (10,50 gld.) titoliĝas brila traduko el la poezia heredaĵo de Tagor; METROPOLITENO (bind. 32,70; broŝ. 24,00 gld.) de Varankin estas ĉefverko de la Esperanta literaturo. La libroj mendeblas ĉe UEA.

